

LA
EKLEZIA REVUO

Internacia Organo de
la Religio kaj la Literaturo

Volumoj 1—3
Numeroj 1—12
Decembro 1917—Julio 1921

Eldonejo:
Farnley Tyas Vicarage, apud Huddersfield, Anglujo.

ENHAVO:

ARTIKOLOJ, TRAKTAĴOJ, SKIZOJ K. C.:

- Abeloj, La, II 14.
 Administracio de la norvega eklezio, La, II 32.
 Alpeto al ĉiuj kristanoj, III 56.
 Alpeto al romakatolikoj alilandaj, II 80.
 Antaŭparolo, I 1.
 Apudesto de Dio, La, III 20.
 Armageddon, II 1.
 Batalhalto, La, II 1.
 Blinduloj, Esperanto-fako por, ĉe la nacia biblioteko (v. ankaŭ anoncajn paĝojn), I 13.
 Bolŝevismo kaj Kristanismo, III 77.
 Burhanismo en Altaĵo, II 83.
 Donado, La evangelio de, I 17.
 Eklezio en nekristanaj landoj, La, I 33.
 Eklezio en Skotlando, La, II 35.
 Eklezio de Irlando, Historio de, I 52.
 Enloĝigo de Izrael en Kanaanon, La, II 86.
 Eŭropo, La mizero, de centra, III 25.
 Faden de la supro, La, II 92.
 Fenomenoj spiritistaj, III 25.
 Fianĉino de la minlaboristo, La, III 42.
 Franca Eklezio, La Romkatolika, III 59.
 Gastaj snoboj, III 65.
 Germanaj Kristanoj, Amikeco kun, II 27.
 Grizaj gefratoj, La, I 58.
 Historio de la Eklezio de Irlando, La, I 52.
 Historio de la misio en Ugando, La, II 56.
 Idealoj kaj metodoj de la pastraro, La, I 17.
 Irlando, Historio de la Eklezio de, I 52.
 Kalevala, III 63.
 Kantpreĝoj de la norvega eklezio, I 56.
 Kavaliro *Roĝer* ĉe sia hejmo, La, I 23.
 Kelkaj aspektoj de la homa naturo, III 7.
 Kiamaniere la Eklezio malsukcesis uzi la okazon de la milito, II 10.
 Kimra Eklezio kaj ĝia nova reĝimo, La, I 21.
 Kolektitaj pensoj de Frato Laŭrenzo, III 90.
 Konscienco, kredaĵoj kaj kritikistoj, II 81.
 Korano, La, II 97.
 Korespondantoj malproksimaj, I 36.
 Kristanigo de Norvegio, La, II 63.
 Kruco blanka, Mondpacligo, III 27.
 Kunfrateco inter la eklezioj, I 18.
 Lepruloj, La misio al la, II 75.
 Ligo de Nacicj, La, II 28.
 Ligo de la nova Ordonon, La, III 38.
 Malliberula Veturilo, La, II 93.
 Milito, La, kaj Misioj, II 27.
 Militmonumento, II 26.
 Misio al la Lepruloj, La, II 75.
 Misia laboro de la Eklezio, La, II 32.
 Misiistaj problemoj de Palestino kaj Egiptujo, II 5.
 Naskiĝo de Väjnämöjnen, La, III 63.
 Nekristanaj landoj, La Eklezio en, I 33.
 Nova Lekciaro, La proponata, I 19.
 Novaj rajtoj de la Angluja Eklezio, La, III 37.
 Ordo de diservo laŭ la finna preĝlibro, II 98, III 15, 68.
 Pacmovado kristana, Grandega, III 32.
 Pastroj kaj milita servado, I 31.
 Pastraro, La idealoj kaj metodoj de la, I 17.
 Preĝejo de S. Sofia, La, II 27.
 Preĝo de Manass, La, II 54.
 Pri ekleziologia kaj teologia vortaro, I 10.
 Pri religio bulgaria, II 60.
 Pri la Vero, I 9.
 Proksimeco, La, II 14.
 Propaca dankofero, II 45.
 Proponata nova lekciaro, La, I 19.
 Rajtoj kaj postuloj de virinoj en la Eklezio, La, I 17.
 Reformo de la interrilato inter la Eklezio Anglikana kaj la ŝtato I 5.
 S. Sofia, La preĝejo de, II 27.
 Sinjoro *Pickwick* glitkuras, II 38.
 Socialistoj kristanaj, III 43.
 Spiritaj sentencoj de Frato Laŭrenco, III 17, 90.

Tri verketoj de *Charles Lamb*, II 40.
 Triunuo, La, II 102.
 Ugando, La Historio de la misio en,
 II 56.
 Unuiĝo en Hindujo, III 34.
 „Via estas la potenco“, II 11.
 Virinoj, La Eklezia deĵorado de (v.
 pĝ. 48), III 36.
 Virinoj en la Eklezio, La rajtoj kaj
 postuloj de, I 17.
 Vortaro, Pri ekleziologia kaj teologia,
 I 10.

POEZIO kaj VERSAĴOJ:

[(m) signifas: kun muziko]

Al la Bandusia fonto, I 41.
 Al la virgulinaj, k. c., I 41.
 Al Vi, Sinjoro, levas ni, II 96.
 Amo kaj morto, II 37.
 Brilas sun' somera, II 96.
 Cielen iris Vi, II 30 (m).
 Dediĉo, II 31 (m).¹
 Dio laboras, I 55 (m).
 Dio, laŭ Kies vort', I 54.
 En reĝa star' kunvenas, III 6 (m).
 Fantazio, II 13.
 Filozofio de l' amo, La, III 16.
 Ĝojiga Lumo, I 2.
Hellas, Ĥoraĵo el, II 67.
Hiawatha, (el), III 12.
 Himno vespera, I 11.
 Ho! eta urbo Betlehem, II 4 (m).
 Kaj ĉu la tempo venas? II 3.
 Kanto de *Shelley*, II 66.
 Kiom da kiaj sabatoj jen estas, III
 11 (m).
 Krio de la cervo, La, III 40.
 Kristo sur la batalkampo, I 4.
 Kristo venas, III 33.
 L' Allegro, III 86.
 Lumo ĉiela, I 51.
 Maljuna skeptikulo, La, I 56.
 Malsatiĝo, La, III 12.
 Odo al la deo, III 39.
 Odo al la okcidenta vento, II 90.
 Paco, Al la, II 49.
 Patro-Altul', ĉestu, II 55 (m).
 Promeso al Zamenhof, I 14.
 Ruĝiginta sango, La, II 97.
 Sankta, sankta, sankta, I 35.
 Se —, I 26.
 Soldato, La, I 23.
 Songo de soldato, I 41.
 Sorĉlernanto, La, II 65.

vidu ankaŭ:

Espero, La, III 85.

RECENZOJ (v. ankaŭ Bibliografio):

Amikoj, La Kristana societo de, I 44.
 Angla kaj Esperanta etimologio, II
 100.
 Bildotabuloj por la instruado de Es-
 peranto, III, 43.
 Bulgara lando kaj popolo, II 72.
 Common commercial language, I 64.
 Concept of Sin, The, II 101.
 El la proksima Oriento, III 44, 72.
 El idioma internacional Esperanto, II
 73.
 Esperanto dum la milito, I 63.
 Esperanto Guide, The, I 65.
 Esperanto i 10 Lektioner, II 17.
 Esperantaj poemoj, I 28.
 Evolution and the doctrine of the
 Trinity, II 102.
 Faka vortareto (ombreloj), III 72.
 Fraŭlino Suzano, III 23.
 Granda vizaĝo el ŝtono, La, II 16.
 Gregg Shorthand adapted to Espe-
 ranto, II 17.
 Hebrews, The Epistle to the, I 42.
 Kantareto kristana (Finna), III 69.
 Karaktero, III 70.
 Kie estas via fido? I 43.
 Kristo kaj la Ligo de Nacioj, III 73.
 Kvakerismo, La, III 70.
 Libro de komuna preĝo, La, II 100,
 III 45.
 Mimi, III 71.
 Ministry of Women, The, III 46.
 Ni militu por ke ni havu pacon, I
 63.
 Nouvelles academiques, II 72.
 Now is the day of Judgement, III 74.
 Ok noveloj de Arnold Bennet, III 71.
 Otavan Esperantosarja, II 73.
 Pli malgrandaj profetaĵoj malkaŝitaj,
 La, I 44.
 Pro kio? III 93.
 Raporta stenografio, III 44.
 Rimvortaro Esperanta, I 63.
 Rozujo ĉiumiljara, III 69.
 Sankta Spirito, La Misio kaj admini-
 strado de la, I 43.
 Ses noveloj (hungaraj), III 93.
 Skolta Esperantista Ligo, Propono
 pri, II 16.
 So fight I, I 64.
 Stenografio, II 17, III 44.
 Unuiĝo de la internaciaj asocioj, I
 62.
 Where is your faith? I 43.

FAKOJ:

- Bibliografio, I 28, 42, 62, kaj v. anoncajn paĝojn; II 15, 72; III 23, 43, 69, 93.
 Eklezia Esperantista Ligo: Kroniko, I 12, 27, 45, 65; II 18, 22, 43, 45, 68, 97; III 22, 47, 68, 94.
 Eklezia Mondo, La, I 2, 15, 29, 49; II 1, 26, 50, 76; III 1, 25, 51, 75.
 L. K. E. (Lingva Komitato de la E. E. L.) v. ankaŭ Vortoj Uzataj, I 47; II 44, 68; III 46, 49, 68.
 Nekrologo, I 28; III 23.
 Vortoj uzataj de La Eklezia Revuo, I 26, 32, 46, 47, 48, 61, 66; II 15, 20, 17, 72; III 49.

GAZETOJ kaj REVUOJ recenzitaj aŭ aluditaj:

- Amerika Esperantisto, II 47.
 British Esperantist, The, I 28.
 Crétien Libre, Le, I 8.
 East and the West, The, II 34; III 31, 34.
 Eklezia Revuo, La, I 1, 18, 26; II 23, 25.
 Esperanta Finnlando, II 24, 47; III 24.
 Esperantista Voĉo, La, II 24.
 Esperanto, I 28; II 24.
 Esperanto Monthly, I 28.
 Estonto, La, II 24.
 Guardian, The, II 80.
 Kataluna Bulteno, La, II 24.
 Literaturo, II 74.
 Monde Espérantiste, Le, I 28.
 Nova Tempo, III 24.
 Outward Bound, III 74.
 Petite Revue, La, II 14.
 Shookokumin Shimbun, II 48.
 Spectator, The, I 5, 23.
 Svisa Espero, II 48.
 Teknika Revuo, La, I 44; II 24.
 Travailleur Espérantiste, Le, II 98.
 Unigita Tuthomaro, La, II 98.
 Verda Stelo, La, II 74.

NOMOJ (Aferoj, personoj, landoj, k. c.):

- Afriko, I 34; II 5, 56.
 Allenby, Generalo, II 1, 5.
 Angluja Eklezio, La, I 5, 19, 29, 31, 49, 52; II 1, 10, 28, 32, 50, 56, 79, 81; III 1, 25, 29, 37, 51.

- Angluja Eklezio, Libro de Komuna Preĝo de la, I 14, 19, 66; II 3, 79, 100; III 45.
 Armenujo, I 16; III 26.
 Auckland, Episkopo de, I 17.
 Aŭstrujo, III 2, 27, 75.
 Biblio, La, I 19, 42, 44, 54; II 102; III 46.
 Birmingham, III 22, 45.
 Bohemujo (v. ankaŭ Ĉeĥoslovakujo), III 2, 75.
 Browne, Episkopo G. F., I 18.
 Bryce, Lord, I 16.
 Bulgarujo, II 65, 72; III 3, 27, 51, 75.
 Butler, J. L., I 28.
 Cardiff, I 21; II 3.
 Cionismo, II 5; III 31.
 Ĉeĥoslovakujo (v. ankaŭ Bohemujo), III 75.
 Dublin, Episkopo de, II 78.
 Durham, I 18.
 Egiptujo, II 5.
 Episkopeco, I 30; III 34.
 Finholt, Josephine, III 94.
 Finnlando, II 73, 98; III 15, 24.
 Francujo, I 8; III 43, 52, 59, 77.
 Germanujo, II 27; III 28.
 Goldschmidt, Thora, III 43.
 Gore, Episkopo C., I 18.
 Greka Eklezio, v. Ortodoksa.
 Halifax, Lord, I 50.
 Harris, W. H., I 18.
 Henson, Episkopo H. H., I 18.
 Hindujo, I 33; II 28, 75; III 34.
 Hungarujo, III 3, 24, 23, 31, 52, 75, 78.
 Hus, J., III 3.
 Ĥinujo, I 34; II 28.
 Irlando, I 52; II 78.
 Italujo, III 53.
 Japanujo, I 34.
 Jerusalemo, I 15; II 2.
 Jesuo (Jezuo), I 25, 26, 32, 61; II 15.
 Judoj, II 5, 86; III 31, 33.
 Jugoslavujo, III 79.
 Kalvinanoj, III 29.
 Kanado, III 29.
 Kimrujo, I 17, 21; II 3, 50; III 3, 30, 80.
 Kongregacia Eklezio, III 2, 29, 34.
 Koptoj, II 7.
 K. U. J. V. (K. A. J. V.), II 35, 78; III 81; k. a.
 Kristanismo, I 5, 15; III 77.
 Lambeth, III 25, 35, 36, 51, 56.
 Letonujo, III 80.
 Lodge, Oliver, III 25.
 London, Episkopo de, I 17.
 Mahometanismo, II 5, 27, 97.

- Metodismo, II 79; III 29.
 Metodismo, Primitiva, II 79; III 1.
 Misioj, I 16, 32, 33; II 5, 27, 32, 52, 56, 75; III 1, 30, 32.
 Montgomery, Episko H. H. I 32.
 Norvegujo, I 56; II 32, 63; III 4, 30.
 Ortodoksa Greka Eklezio (v. ankaŭ Bulgarujo), I 83; II 27, 81; III 33, 79, 83.
 Page W. M., I 25.
 Palestino, I 16, 31; III 31.
 Patriko, Sankta, III 40.
 Petrie, Prof. Flinders, II 88.
 Polujo, III 54.
 Portugalujo, III 81.
 Presbiterianismo, I 30; II 35; III 29, 34, 53.
 Reunuiĝo de la Kristanaro, II 2, 26, 79; III 25, 39, 34, 55, 56.
 Rio de Janeiro, I 28.
 Rom-Katolika Eklezio, La, I 11, 21, 50, 52; II 7, 10, 62, 80; III 2, 25, 27, 28, 33, 52, 53, 55, 59, 68, 73, 75, 76, 77.
 Rumanujo, III 78.
 Rusujo, I 16, 31; II 28, 81; III 31, 82.
 S. Asaph, Episkopo de, III 30.
 Senior, C. J., III 23.
 Siberujo, II 81; III 31.
 Sirujo, I 16; II 9; III 31, 35.
 Skotlando, I 17, 30, 50; II 35; 52.
 Stanley, II 56.
 Svedujo, II 29, 53, 76; III 5, 32.
 Svisujo, II 53; III 24, 55.
 Tibeto, III 32.
 Turkujo, II 27, 61.
 Temple, Ĉefepiskopo, I 7, 18.
 Temple, Episkopo W., I 7; III 1.
 Ukrainio, I 31.
 Usono, I 30; II 79; III 5, 33.
 Vickman, A., III 32.
 Y. M. C. A. (v. K. U. J. V.)
 Zamenhof, Dro. L. L., I 14.
 Dale, Thomas, II 79; III 2.
 Downer, A. C., I 42; II 10.
 Freitas; H. D. G. de, III 81.
 Fridén, Georg, II 29, 53, 76; III 32.
 Furmanik, Adam, III 54.
 Griffiths, J. S. II 86.
 Harris, W. H., I 21; II 50; III 3, 30, 71, 80.
 Hill, John, III 44.
 Indra, Z., III 80, 84.
 Kanoniko,* I 2, 15.
 Krestanov, Ivan, II 60, 72; III 3, 27, 51, 75.
 Lamovenkas, II 11.
 Lindsay, T. S.,* I 52.
 Long, L. A., I 33; II 16, 32; III 34, 93.
 Longford, W. W., II 5.
 Luyken, H. A., III 7 (v. 39)
 Metzger, M. J., III 27.
 „Noel, Leon“, III 14.
 Page W. M., II 35.
 Pelikano, II 65.
 Pepper, W., III 6 (m).
 Perriard, J., III 55.
 Price, E. J., III 2.
 Redakcio, La, I 1, 25, 32; II 16, 25, 40, 49; III 51.
 Senior, C. J., I 5, 47, 67.
 Serisev, I., II 81, 83.
 Sondisto, II 52; III 25, 71.
 Stojan, P., III 79.
 Swancy, T. Erskine, I 19.
 Šefer, A., I 14.
 Thiercelin, J., III 52, 59, 77.
 Törnquist, Algot, II 76, 97; III 5.
 Vona, F. S. de, III 33.
 Warden, J. M., I 61.
 Western, W. C., III 29.

2. Tradukitaj en *Eklezia Revuo* :

- Abelard, III 11.
 Addison, Joseph, I 23.
 Ainger, Kanoniko, I 55.
 Ashley, A. J., I 45.
 Bacon, Francis, I 9.
 Barnby Joseph, II 4 (m).
 Borthwick, Jane, II 3.
 Brooke, Rupert, I 323.
 Brooks, Episkopo Phillips, II 24.
 Campbell, Thomas, I 41.
 Dickens, Charles, II 38, 93.
 Dix, W. C., II 96.
 Dykes, J. B., II 30 (m)
 Edwards, R. S., II 80.
 Fairless, Michael, I 58.
 Gastinel, Odette, II 14.
 Gerber, Maurice, II 56.
 Goethe, II 65.

VERKINTOJ:

1. Por *La Eklezia Revuo* :

- Ackerley, F. G., III 72.
 Aglionby, Dro., II 81.
 Anofrijew, V., III 82.
 Arĥidiakono, I 29, 49; II 1, 26.
 Arĥidiakono de Dublin, La, II 78.
 Ashley, A. J., I 43; II 22, 100; III 49.
 Balkányi, E. III 29, 52, 78.
 Bonnevie, H., II 63; III 4, 30.
 Butler, M. C., II 15, 17.
 Coates, M. I., III 85 (m).
 Curry, A. L., I 62; II 72; III 36.

Havergal, F. R., II 31.
 Hayward, W., II 75.
 Hebel, J. P., III 42.
 Heber, R., I 11, 35.
 Herrick, Robert, I 41.
 Horatius, I 41.
 How, Episkopo W. W., II 96.
 Keats, John, II 13.
 Keble, J., I 2.
 Kipling, Rudyard, I 26.
 Lamb, Charles, I 36; II 40.
 Laŭrenco, Frato, III 17, 90.
 Longfellow, H. W., III 12.
 Macduff, J. R., III 33.
 Marriott, J., I 54.
 Milton, John, III 86.
 Mozart, II 31 (m).
 Newman, Kardinalo J. H., I 51.
 Noyes, Alfred, I 56.
 Patmore, Coventry, II 37.
 Prudentius, II 55.
 S. Victor, A. de, III 6.
 Shakespeare, W., II 14.
 Shelley, P. B., II 66, 67, 90; III 16
 Small, A., I 55 (m).
 Stewart, R. P., II 55 (m).
 Thackeray, W. M., III 65.
 Toke, Emma II 30.
 Vörösmarty, M. de. III 23.
 Whateley, I 11.
 Whitmell, C. T., I 4.
 Wordsworth, W., III 39.

3. de libroj recenzitej:

[(e) signifas, Esperanta verkinto.]

Argus, III 93 (e).
 Avoto, I 63; II 16 (e).
 Avsejenko, V. G., III 23.
 Beach, G. C., I 64.
 Bennett, Arnold., III 71.
 Burney, Dro C. F., II 86.
 Butler, M. C., III 44 (e).
 Catchpool, T. C., III 70.
 Downer, A. C., I 43.
 Emmet, C. W., II 81.
 Etten, H. van, I 44 (III 43).
 Giesy, J. U., III 71.
 Hawthorne, Nathaniel, II 16.
 Hyde, Maurice, I 65.

Jackson, E. L., II 17 (e).
 Kent, A. Barton, I 64.
 Krestanov, Iv., III 44, 72 (e).
 Luiscius, J. M. van S., III 70.
 M'Dowall, S. A., II 102.
 Medem, P., III 23.
 Nairne, A., I 42.
 Rifling, Bruno, II 17.
 Sinnotte, E., Alleyne, I 62 (e).
 Smilsy, J. L., III 74.
 Smith, Nowell, I 43.
 Tennant, F. R., II 10.
 Wagnalls, Mabel. III 69.
 Williams, H. Lukyn, I 44.

TRADUKINTOJ:

[(r) signifas: de verko recenzita].

Ashley, A. J., I 9, 14, 41, 54; II 13,
 55.
 Bonnevie, H., I 56.
 Briggs, Louise, I 58; II 14, 45, 66,
 90, 93; III 16, 65, 86.
 Butler, M. C., I 23; II 3.
 Curry, A. L., I 2, 11, 35, 41; II 13,
 30, 54, 96.
 Fridén, Georg, II 92; III 42.
 Harvey, William, I 51; II 4; III 33.
 Hide, W. W., II 67.
 Hill, John, I 23.
 Lamovenkas, II 40, 41, 102.
 Lëggat, E. O., III 39.
 Long, B. E., I 26
 Long, L. A., I 4, 14, 26, 56, 80, 96.
 Lyndridge, A. W., II 75.
 Maling, A. T., II 37; III 17, 90.
 Merchant, John, II 56.
 Page, W. M., I 55; III 40.
 Pātiälä, H. J., II 98.
 Payson, E. S., III 69, 71 (r),
 Rantala, V. A., III 63.
 Senior, C. J., I 14,
 Swanzy, T. E., I 14.
 Šefer, Ad., II 5; III 12.
 Truss, M. D., II 14.
 Wackrill, A., III 71 (r).
 Wilson, John, I 36; II 38, 42.
 Yelland, E. E., II 16 (r).

La Eklezia Revuo

Organo de la Eklezia Esperantista Ligo



Redakcio kaj Administracio:
FARNLEY TYAS VICARAGE,
HUDDERSFIELD, ANGLUJO.

ELDONODATO:
La 31-a de JANUARO 1921

NUMERO 11.

[3a. VOLUMO. No. 3.]

TRIA KVARONJARO, 1920.

JARABONO: (AFRANKITE)

EN LA BRITA INSULARO, 2ŝ. 6p.

EKSTERLANDE, Sm. 1.5

SPECIMENA NUMERO (AFRANKITE), Sd. 30

PRO REUNIĜO
ANOJ DE ĈIU KRISTANA
EKLEZIO ALIĜU AL



LA EKLEZIA
ESPERANTISTA LIGO.
Adr: Farnley Tyas Vicarage,
apud Huddersfield, Anglujo.

REDAKCIAJ KAJ ADMINISTRACIAJ AVIZOJ

Redaktoro kaj Administranto de *La Eklezia Revuo*: lia presbitera moŝto A. J. ASHLEY, F. B. E. A., paroĥestro de Farnley Tyas, Huddersfield, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiun komunikadon rilate la Revuon.

Eldonodato: *La Eklezia Revuo* estas kvaronjara. Pro diversaj kaŭzoj rilate la efikecon de la revuo estas neutila precizigi la eldonodaton; sed ĝenerale oni elsendas ĝin dum la unua duono de ĉiu kvaronjaro.

Enhavotabelon kaj titolopaĝon oni eldonas post eliĝo de ĉiu dekduo da kajoroj. La Administranto ne eldonas anstataŭbindan kovrilon; sed volas bindigi la Revuon por abonantoj laŭ kondiĉoj speciale aranĝeblaj.

Reklamtarifo: (unufoja enpresoj) 1 paĝo, Sm. 15; 1/2 p., Sm. 8; 1/4 p., Sm. 4.5; 1/8 p., Sm. 2.5; 10 vortoj, Sd. 40. Rabato por kvar aŭ plimultaj enpresoj. Petu detalan tarifon. La Redakcio kaj Administracio penas certigi, ke la reklamantoj estas fidindaj sed tute ne akceptas ian respondecon pri reklamoj.

Manuskripto, k. t. p.: La Redaktoro zorge konsideros manuskripton alsenditan; sed li ne akceptas ian respondecon pri ĝi, kaj ĝenerale ne resendas neakceptitan manuskripton se oni ne kunsendas adresitan koverton kaj ankaŭ poŝtelspezon. Kunlaborantoj bonvole skribu legeble, preferinde per skribmaŝino, kaj nur sur unu flanko de la papero.

Korekto, Represo, k. t. p.: la Redaktoro rezervas al si rajton korekti manuskripton enpresotan en *La Eklezia Revuo*. Sen interkonsento kun la Redaktoro represi aŭ nacilingven traduki artikolon aŭ tradukaĵon, kiu aperas en *La Eklezia Revuo*, estas malpermesate.

Recenzo: la Revuo raportas novajn verkojn, gazetojn, k.t.p., kondiĉe ke la Redaktoro donace ricevu DU EKZEMPLEROJN kaj, ke ili estu sufiĉe gravaj kaj interesaj. Oni interŝanĝas tiun ĉi Revuon kontraŭ alilandaj gazetoj po du ekzempleroj.

Kaŭze de necertaj kondiĉoj de la nuna tempo la Redakcio ne *garantias* publikigon de *La Eklezia Revuo* aŭ al abonantoj aŭ al reklamantoj.

Respondeco. La Redaktoro ne akceptas respondecon pri opinioj esprimataj en artikoloj de *La Eklezia Revuo*.

AL ĈIU SERIOZA ESPERANTISTO

La sukceso de miaj Esperantaj Poŝtaj Kursoj estas treege kontentiga. Esperantistoj en ĉiu partoj de la Anglalingva mondo nun profitas per la kapabla instruado liverata per la Kursoj, kaj ili raviĝas pro la komprenebla, klariga, ŝatiga maniero laŭ kiu iliaj pensoj estas kontrolataj, iliaj eraroj klariĝas, kaj iliaj malhelpaĵoj formetiĝas. Ĉi tio fariĝas, ne per la magio, sed per originalaj laŭproblemaj ekzemploj, aludoj kaj klarigoj. La studentoj ŝatas la senton de individua simpatio kiu troviĝas inter ili kaj la Instruanto, kiel inter samideanoj. Tiu ĉi "atmosfera" estas esenca elemento de mia sistemo; kaj helpis multe al la sukceso de la Kursoj. Vi povas preni la Unuagradan Kurson (21/-) por komencantoj kaj rekomencantoj; la Altgradan Kurson (21/-) por tiuj kiuj volas akiri la Altgradan Diplomon; kaj la Tradukan Kurson, por tiuj kiuj volas igi sin kapablaj traduki Esperanten la klasikaĵojn de la Angla Lingvo.

Unu Enskribon oni akceptas por la Tri Kursoj je la speciala malalta sumo de £2, 7s. Mi estas preta kontroli vian studadon de la komenco ĝis (kaj preter) la Altgrada Ekzameno. Permesu al mi konsili pri viaj bezonoj.

Petu Prospektojn, kiuj klarigas ĉion. Inkluzivaj Pagoj. Individua instruado.

ALBERT CHAPMAN, F. B. E. A. (Hons. Diploma), M. S. P.
WALTON HIGHWAY, WISBECH

L'ESPERANTO

Internacia Monata Revuo

Sub patronado de Itala Katedro de Esperanto
Eliras en S. Vito al Tagliamento (Italio)

LITERATURA KAJ KORESPONDA
FAKO. LINGVAJ LEKCIONOJ PER ES
PERANTO. ENIGMOJ. KONKURSOJ

Jarabono Italajn Fr. (Lirojn) 5

Plena Kurso de Itala Lingvo por Espe-
rantistoj

Ital. Fr. (aŭ Lirojn) 6.50

AMERIKA ESPERANTISTO

du-lingva organo de la Esp.-Asocio de
N. Ameriko celas antaŭigi

ESPERANTON

inter la plej multenombra parolantaro de la
angla lingvo en la mondo:

Jen nia bataalkampo!

1 jaro — \$ 1.00 usona; 20 resp.-kup.

ESPERANTO OFFICE

W. NEWTON, 65, Mass., Usono.

La Eklezia Revuo

NUMERO II. VOL. 3, NO. 3.

TRIA KVARONJARO, 1920.

ENHAVO:

| | | | |
|---|----|--|----|
| La Eklezia Mondo | 51 | Gastaj Snoboj (<i>Thackeray</i>) | 65 |
| Alpeto al Ĉiuj Kristanoj (Anglikana Episkopato) | 56 | Kroniko de la E. E. L.: | |
| La Romkatolika Franca Eklezio (<i>Thiercelin</i>) | 59 | (A) Ĝenerala | 68 |
| La Naskiĝo de <i>Vājñāmōjnen</i> (Laŭ <i>Kalevala</i>) | 63 | (B) Lingva Komitato Eklezia | 68 |
| | | Bibliografio: | |
| | | (A) Verkoj Internaciaj | 69 |
| | | (B) Verkoj Nacilingvaj | 74 |

LA EKLEZIA MONDO.

ANGLUJO.

LA KONFERENCO ĈE *Lambeth*. Nenia okazintaĵo en la Anglikana Eklezio lastatempe eĉ preskaŭ egalas la Konferencon ĉe *Lambeth* per graveco; la Konferencon partoprenis 252 episkopoj reprezentantaj ĉiun gravan partion, ĉiun skolon, ĉiun parton — hejman kaj kolonian — de la Eklezio. La temoj diskutataj estis tiuj, kiujn la Eklezio (kaj iugrade la mondo ĝenerale) plej multe kaj fervore pridiskutas nuntempe, konsiderante ilin esencaĵoj de la progresado en nia mondaĝo: — la Reunuiĝo de la Eklezioj; la Deĵorado de Virinoj; la Kristaneco kaj Internaciaj Rilatoj precipe la Ligo de Nacioj; Misiaj Problemoj; la Kristana Fido rilate al Spiritismo, Kristana Scienco, Teozofio, k.c.; Problemoj de la Geedza Stato kaj de Seksa Moraleco; la Oportuno de la Eklezio rilate al Industria kaj Sociaj Problemoj. Tamen, kvankam la diskutadoj pri ĉi tiuj temoj estas plej altgrade valoraj kaj plensignifaj, la ĉefa rezultato de la Konferenco sendube estas la eldono de la »Alpeto al Ĉiuj Kristanoj» per kiu unuvoĉe la Anglikana Eklezio grandanime kaj tute kristspirite alvokas la tutan Eklezion de la Kristo al reunuiĝo. Tiun alvokon ni prezentas al niaj legantoj per tre fidinda tradukaĵo (p. 56) preĝante, ke Dio ĝin benu kaj fruktigu. La Konferenco daŭris de Julio 2 ĝis Aŭgusto 8, 1920, kiam okazis trastrata procesio de la Episkopoj kaj Solena Eŭkaristio en la Katedralo de S. Paŭlo en Londono. — *Redak.*

BULGARUJO.

FORMO DE LA EKLEZIO. — La eklezia komisiono, kiu estis ŝarĝita transformi la ortodoksan bulgaran eklezion, okupiĝis per la demando pri la estonta formo de tiu eklezio.

La komisio detale ekzamenis la demandon pri enkonduko de la patriarĥa administra formo ĉe ni. Sed vidante, ke ankaŭ tiu ĉi formo perdis sian malnovkanonan sencon; ke la patriarĥeco ordinare supozas vastan eklezian regionon, kian, pro la kunfluiĝintaj cirkonstancoj, nun Bulgarujo ne prezentas; kaj, ke la starigo de patriarĥeco fariĝis ĉiam kun la konsento aŭ almenaŭ kun la rekono de la sendependaj ortodoksaj eklezioj, precipe de la pli malnovaj, kaj ke tian konsenton aŭ rekono, ĝi ankoraŭ ne ricevis entute; kaj plie, ke simila proklamo de patriarĥeco ankoraŭ pli embarasus la aranĝon de la bulgara intereklezia situacio — la komisio sin esprimis kontraŭ la patriarĥa administra formo. La komisio tamen ne akceptis ankaŭ la ĉefpastran (metropolitan) administran formon, sed alprenis la ekzarĥan, kiu, laŭsence estas ja metropolitana, atentante, ke la nomo *Ekzarĥo* fariĝis tre kara al ĉiuj ortodoksaj bulgaroj en la reĝolando kaj ekstere, kiuj sub la gvido de la ekzarĥio atingis spiritan progreson, kaj venis al nacia memkonscio; ke historie kaj kanone estas pravigite sin ligi kun la nomo *Ekzarĥo*, imagō pri ĉefestro de aŭtokefala, eklezia regiono en la senco, kiun tiu nomo havis en la kvara kaj kvina jarcentoj; kaj ke la nomo *Ekzarĥo* estas de tiaj deveno kaj naturo, ke ĝi ne prezentas malhelpon por la restarigo de la kanona kunrilato de la bulgara eklezio kun la aliaj aŭtokefalaj, ortodoksaj eklezioj. Pro la supraj konsideroj, la komisio konkludis: konservi por la ĉefestro de la bulgara, ortodoksa eklezio la nomon *Ekzarĥo Bulgara*. *De nia bulgara Korespondisto*, IV. H. KR—OFF.

FRANCUJO.

INTERRILATO DE LA REGISTARO FRANCA KUN LA PAPO. Nune temas ĉie en Francio, pri la rekomenco de la oficialaj rilatoj inter la Registaro kaj la Papo. Jam la traktadoj estis ekkomencitaj kaj ŝajnis bonvojoj. Nune, ili kvazaŭ haltis. Tamen sendube revivos post nelonge la interparoladoj, kaj la solvo estos tiel certa kiel ankaŭ baldaŭa. Ni opinias tiun ĉi temon sufiĉe interesa, por ke ni rememorigu per aparta artikolo la ĉefajn okazojn de la romkatolika historio en Francujo, de la milsepcentokdekaŭjara Revolucio ĝis la nuna tempo. (Vidu p. 59). — *De nia Korespondisto franca*, Pastro J. THIERCELIN.

HUNGARUJO.

PAPA AMBASADOREJO EN *Budapest* funkcios verŝajne en la proksima tempo. Laŭ demando de la papa ŝtatestretario la hungara registaro konsentis, ke *Lorenzo Schioppa*, bavaruja nunciatura aŭditorio estu en *Budapest* la ambasadoro de la Papo.

MIZERO DE LA HUNGARAJ PASTROFAMILIOJ. Granda mizero regadas en Hungarujo ĝenerale; sed la profesiistoj, la studentoj, kaj precipe la pastroj ekzistas en teruraj vivkondiĉoj. *Kalvinista Szemle* (*Kalvinana Revuo*) raportas: »Se la hungaraj reformitaj pastroj estas la duonfiloj de la ŝtato, la pensumitaj pastroj

kaj ties vidvinoj kaj orfoj estas la forlasitaj infanoj de la hungara socio. En tuta jaro ili ricevas 300—600 kronojn. La ŝtato ne povas doni ion. Per tiu sumo oni ne povas vivi, eĉ nur kelkajn semajnojn!» Pensiumita pastro skribas: 'Mi baraktas en mizero. Per vendado de miaj libroj kaj restintaj mebloj mi vivsubtenas min nun; sed nun mi ne plu havas ion por vendi. Al la nutrajmanko venas nun la vestaĵ-kaj ŝu-manko. Mi vivas ĉe mia filino, profesoredzino, kiu kun kvin familianoj ankaŭ en mizero vivas'. Ni petas niajn eksterlandajn samreligianojn helpi, kiel ili jam montris sian aman simpatian. Miloj da holandaj reformitoj ame ĉirkaŭbrakis niajn infanojn. La amerikaj, anglaj, skotaj, laste ankaŭ la skandinavaj fratoj per riĉaj nutraj- kaj vestaĵ-sendaĵoj helpas la publikmizeron. Ni petas, ke la eklezi-gvidantoj, kiuj simpatias kun la hungara Kalvina Eklezio, aŭdante la vorton de la kompto Krista komencu kolekton por la hungaraj pastrovidvinoj, orfoj, kaj pensiumitaj pastroj. Modesta kaj malforta estas nia voĉo; sed en ĝi ploras la senfina plendado de 850 hungaraj pastrovidvinoj, 337 orfoj, kaj proksimume 200 pensiumitaj pastroj.

AGADO DE LA EKLEZIOJ PROTESTANTAJ POR LA HUNGARAJ EKLEZIOJ. La Ĝenerala Presbiteriana Interligo (Sekcio Orienta) jam la 3an. de februaro, 1919, petis en Memorando, ke la Packonferenco certigu la religilibercon kaj la unuecon de la protestantaj eklezioj. Poste simile agadis la Unuigita Libera Eklezio de Skotlando, la Eklezio de Skotlando, la Presbiteriana Eklezio de Anglujo, la Presbiteriana Eklezio de Irlando, k.c. Tiu ĉi granda, unueca helpo de la eksterlandaj frateklezioj plenigis la korojn de la hungaraj protestantoj per dankemeco kaj fido en la estonteco, ne nur de ilia propra eklezia unueco, sed ankaŭ de la tutmonda, per komuna forto laboranta, protestanta eklezio. — *De nia hungara Korespondanto*, PAŬLO BALKANYI.

ITALUJO.

ROMKATOLIKA PASTRARO KAJ LA REFORMO DE EKLEZIA DISCIPLINO. Grava malkvietiĝo ekzistas ĉe la Sicilia pastraro, kiu formis asocion por la reformo de eklezia disciplino. Ĉi tiu Asocio, kiu enkalkulas pli ol 700 anojn, antaŭ ne longe prezentis petskribon al Lia Kardinala Moŝto, Ĉefepiskopo *Lualdi* de *Palermo*, en kiu la jenaj reformoj, inter aliaj, estas petataj: (1) forigo de deviga needza vivado; (2) forigo de deviga vestado per sutano ekster la preĝejo; (3) permeso por praktiki alian profesion.

EKLEZIA FEDERACIIGO. Unu el la plej gravaj decidoj de la Ĉiujara Sinodo de la Valdensa Eklezio en Italujo estis aprobo de la projekto por la federaciigo de ĉiuj protestantaj eklezioj en Italujo. Estas esperate, ke tia federaciigo estu unu paŝo alkondukanta al la unuigo de la eklezioj. — *De nia Repraesentanto en Italujo*.

POLUJO.

POLUJO KAJ ĜIA RELIGIA STATO.—En la nuna mondo sendube komenciĝas la nova epoko sociala, religia. Malnovaj politikaj formoj interŝanĝiĝas. Aperas universala aliformiĝo. El haoso de grandegaj bataloj kaj internaciaj revolucioj eliĝas rekte nova tero. Ni rigardu ekzemple, kiel provon evidentan, la reviviĝintan Pollandon. Post 120-jara, terura mallibero Polujo fariĝis libera. Strange tiu ĉi lando komencas ludi ekstere kaj interne mirindan rolon. Varie diversaj personoj rigardas ĝin; sed vere *facta loquuntur*. La dia Providenco nun preparas ne nur novan, socialan mondon politikan, sed precipe preparas la bezonatajn kondiĉojn por realigi sur la nova tero la novan ĉielon, t.e., la renovigitan religion, kiu alproksimigos al Dio ĉiun homon, ĉiun popolon—kaj tiam malaperos por ĉiam nunaj religiaj trompoj: historiaj, privataj,—precipe ĉiuj trouzoj hierarĥiaj. Tiam la homaro konos la unu Paŝtiston, veran Jesuon Kriston—kaj fariĝos tiam unu ŝafejo religia, unu Eklezio ŝafida! Tio estos miraklo, dia faro, triumfo de diaj projektoj, la efektiviĝo, plenumiĝo de la Evangelio!

La ekscito de popoloj por prepari ilin al dia influo jam estas farita. Ekzemple, ĝis nun Polujo, kovriĝinta per religia kuprorusto, komencas refleksan, spiritan movadon. Evidentaj signaloj de tiu ĉi grandega laboro estas inter poloj sekvantaj: apartiĝanta liberiga penado, por emancipi siajn animojn de influo roma. Pro tio komenciĝis fervora movado de nacia, malnova, katolika Eklezio, sen papo sed kun unu paŝtisto, Jesuo Kristo. Poloj, ĉiam ĝis nun fidelaj al la papa trono, komencas organizi aparte laŭ la Evangelio sian vivon. Frontuloj de tiu ĉi laboro inter poloj estis la mortinta episkopo en Ameriko *Koztowski*, kaj, plue antaŭen gvidanta tiun ĉi movadon, la glorega episkopo pola, *Hodur* (loĝanta en *Scranton, Pa.*), kiu sendis delegiton, Pastron *Krupski*, por disvastigi la ideon de la nacia, pola, malnovkatolika eklezio en la patrujo. Pastro *Krupski* vizitis Krakovon, kaj Varsovion, farante lekciojn kaj paroladojn. La duan faktoron reprezentas fervora pastro, Andreo *Huŝno*, kiu estas fondinto de la katolika, demokrata eklezio, sendependa de Romo. La ĉefa loĝejo de tiu ĉi batalanto estas la paroĥejo de *Mstyczow*, proksima al Krakovo. Programoj de ambaŭ eklezioj enhavas preskaŭ la saman cela don: forigi trouzojn de la hierarĥio; redoni al la popolo la rajtojn malnovajn en la Eklezio; forigi la lingvon latinan, anstataŭante ĝin per lingvo nacia, k.t.p. Do, la pastraro devas servi al la popolo, ne regi, estante modelo de vera, krista, evangelia vivado.

Tamen la du suprecititaj faktoroj estas nur esprimo de racionala, prudenta penado de homoj, kiuj sentas la devon de necesa reformo, por kiu volonte penas labori nur laŭ konscienco, intelekto kaj nobleco homaj. Tiuj ĉi entreprenoj religiaj estas, por tiel diri, privataj provoj, eksperimentoj, specimenoj, sed ne havas karakteron de apostoleco dia, ne havas elementon kreantan desupre. Rimarkinde! Polujo en sia koro spirita posedas pli grandajn, v'v'ajn ideojn diajn, nome, ideojn de

Towjanismo, t.e. Mesianismo, kaj Mariavitismo. Ili prezentas faktoron desupran, plenan de la fortega potenco de ĉiela inspiro. Polujo estas mirinda kaj grandega en la suno de la Mesianismo kaj la Mariavitismo. Ni devas tiun ĉi landon ekkoni de flanko interna, revivigante kaj refreŝigante la veran signifon de dia providenca apostoleco inter popoloj ĝis nun disbatitaj morale, kiun apostolecon Polujo vere devas plenumi. En sekvanta komunikaĵo («Polujo kaj ĝia misio providenca laŭ Mesianismo kaj Mariavitismo») ni prezentos la bazon kaj principojn, sur kiuj estas apogita la apostoleco mesiana de Polujo inter popoloj, por realigi kaj plirapidigi la alvenon de la Dia Regno sur nia tero. — *De nia Reprezentisto en la Malnovkatolika Eklezio de Polujo, Pastro ADAM FURMANIK.*

SVISUJO.

DISKUTOJ KAJ CELADO AL EKLEZIA REUNUIGO. En nia landeto ne okazis ĉi tiun jaron grava religia okazintaĵo. La mondmilito, de kies finiĝo oni atendis ĉe ni novan homaron, purigitan per la sufero, alportis kontraŭe multajn malbonaĵojn: plikarigon de la vivo; sekve, malkonsenton inter la homaj klasoj; kreskantan soifon al plezuroj; kaj tiel plu. Sekve de tio oni multe diskutis ĉe la reformitaj eklezioj pri la devoj de la kristanoj. Multaj kondamnis la militservojn kiel kontraŭreligiajn kaj sekve deklaris, ke ili ne povas akcepti la tutan Sanktan Skribon, precipe la malnovan testamenton kiel la dian parolon, k.t.p. Tiuj diskutoj fine lacigis nin; kaj nun oni povas diri, ke la eklezioj »pripensas«. Ilia ĉefa okupo ŝajnas esti, kiel eksterlande, la unuigo de ĉiuj reformitaj sektoj; kaj multaj kunvenoj okazis tiucele en la jaro. Sube estas raporto koncernanta la pli gravan, kiu estis internacia kaj okazis en Ĝenevo dum Aŭgusto. Laŭ la opinio de la partoprenantoj, tiu »kongreso» havis grandan sukceson.

KUNVENO »KREDO KAJ DISCIPLINO». Internacia kunveno okazis sub tiu nomo en Ĝenevo dum Aŭgusto. Tiu kunveno celis la fondon de unu »societo de la eklezioj», kaj havis, laŭ la opinio de la partoprenantoj grandan sukceson. Ĝia iniciatoro estis Lia Episkopa Moŝto de *New York, C. H. Brent*; kaj ĝia organizanto estis Lia Presbitera Moŝto *Robert Gardiner*. Delegitoj de ĉiuj grandaj eklezioj (krom katolikoj romanaj) ĉeestis; ili venis el kvardek landoj kaj parolis multe da lingvoj. La oficialaj lingvoj de la kongreso estis la angla, la franca, kaj la germana.

Tre interesaj fariĝis la kunsidoj, en kiu oni sentis grandan paceman spiriton. Komisiono formiĝis; ĝia tasko estas daŭrigi la laboron de la kongreso ĝis la proksima kunveno, kiu devas okazi verŝajne en *Jerusalem*.

ALVENO EN BERN DE LA UNUA APOSTOLA NUNCIO DE LA PAPO. La 8an. de Nov. 1920, estis akceptita ĉe la Svisa Registaro la unua nuncio de la Papo en Svisujo, lia Kardinala Moŝto *Maglione*. Tiu okazintaĵo estis certe surprizo al la pli granda parto de la svisa

ALPETO AL ĈIUJ KRISTANOJ.

DE LA EPISKOPOJ KUNVENINTAJ EN LAMBETH, 1920.

Ni, la Ĉefepiskopoj, Episkopoj Metropolaj, kaj aliaj Episkopoj de la Sankta Katolika Eklezio en plena komunua komuneco kun la Eklezio Anglikana, en konferenco kunvenintaj, kŝnciante la respondecon nuntempe sur nin metitan, kaj kŝnciante la simpation kaj la preĝojn de multaj enuloj kaj eksteruloj de nia komunua komuneco, faras jenan alpeton al ĉiuj kristanoj:

Ni konfesas ĉiujn kredantojn je nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiuj estas baptitaj en la nomon de la Sankta Triunuo, kiel partoprenantojn kun ni en la aneco de la Universala Eklezio de Kristo, kiu estas lia Korpo. Ni kredas, ke la Sankta Spirito laŭ maniero tre serioza kaj aparta vokis nin kuniĝi en pentado kaj preĝado kun ĉiuj, kiuj bedaŭras la disecon inter kristanoj, kaj kiuj estas inspiritaj per la vizio kaj espero je videbla unueco de la tuta Eklezio.

1. Ni kredas, ke Dio volas kunulecon. Per la propra ago de Dio tiu ĉi kunuleco estas farita en kaj pere de Jesuo Kristo, kaj ĝia vivo estas en lia Spirito. Ni kredas, ke estas la celo de Dio elmontri ĉi tiun kunulecon, tiom kiom ĝi rilatas al ĉi tiu mondo, per societo publika, videbla, kaj unuestanta, tenanta unu fidon, havanta proprajn oficistojn konatajn, uzanta didonitajn gracilojn, kaj inspiranta ĉiujn ĝiajn anojn por servado mondvasta de la Regno de Dio. Jen tio, kion ni nomas la Eklezio Katolika.

2. Tiu ĉi unuestanta kunuleco ne estas hodiaŭ videbla en la mondo. Unuflanke estas aliaj malnovaj komunumoj episkopanaj en la Oriento kaj la Okcidento (deeŭropaj), al kiuj nia estas ligita per multaj ligiloj de komunaj fido kaj tradicio. Aliflanke estas la grandaj neepiskopanaj komunumoj, starantaj pro riĉaj elementoj de la vero, la libereco kaj la vivo, kiuj sen ili povis esti malklarigitaj aŭ malatentitaj. Kun ili ni estas intime ligitaj per multaj parencecoj rasaj, historiaj kaj spiritaj. Ni ameme konservas fervoran esperon, ke ĉiuj ĉi tiuj komunumoj, kaj nia, estos kondukataj de la Spirito en la unuecon

popolo; kaj ĝi estas tre diversmaniere preparolita ĉe la protestantoj, kiuj troviĝas nun antaŭ farita fakto kaj ne plu povas pritrakti la aferon. Kia ajn estas la opinio de la popolo, oni povas diri, ke la akcepto estas pli-malpli pruvo de la progreso de la Romkatolikismo en Svisujo. Gravaj sekvoj certe rezultos.—*De* JOHANO FERRIAD, *nia Korespondisto en Svisujo.*

de la fido kaj la konon je la Filo de Dio. Tamen, efektive ni ĉiuj estas organizitaj laŭ diversaj grupoj, kaj ĉiu konservas por si mem donacojn, kiuj rajte apartenas al la tuta kunuleco; kaj ĉiu havas tendencon vivi sian propran vivon aparte de la restaĵo.

3. La kaŭzoj de disiĝo troviĝas profunde en la estinteco, kaj estas neniel aŭ simplaj aŭ tute kulpindaj. Tamen, neniu povas dubi, ke la obstino, la ambicio, kaj manko de la amo inter kristanoj estis ĉefaj faktoroj en la miksitaj procedoj; kaj, ke ĉi tiuj, kune kun blindeco pri la pekeco de disiĝo, estas ankoraŭ ĉefe respondaj pri la breĉoj de la kristanaro. Ni konfesas, ke ĉi tiu stato de rompita kunuleco estas kontraŭa al la volo de Dio; kaj ni deziras konfesi sincere nian parton en la kulpeco rilate tiun kripligon de la korpo de Kristo, kaj rilate la malhelpon al la agado de lia Spirito.

4. La tempoj vokas nin al nova vidpunkto kaj novaj rimedoj. Oni ne povas sufiĉe koncepti la fidon, nek inde faradi la batalon pro la Regno, dum la korpo estas disigita, kaj, pro tio, ne povas kreski ĝis la pleneco de la vivo de Kristo. La tempo jam venis, ni opinias, kiam ĉiuj disigitaj grupoj kristanaj devas konsenti forgesi la malantaŭaĵojn kaj kun etendita atento celadi unu reunuigitan eklezion katolikan. La forigo de la bariloj, kiuj leviĝis inter ili, estos kaŝzata nur per nova kunuleco de tiuj, kies vizaĝoj estas difinite tien turnitaj.

La vizio, kiu stariĝas antaŭ ni, estas vizio de eklezio malfalse katolika, lojala al la vero, kolektanta en ĝian kunulecon ĉiujn, kiuj »konfesas kaj nomas sin kristanoj», en kies videbla unueco ĉiuj trezoroj de la fido kaj la ordo, postlasitaj kiel heredaĵo de la estinteco al la estonteco, estos posedataj komune, kaj estos uzeblaj al la tuta korpo de Kristo. En ĉi tiu kunuleco komunumoj kristanaj, nuntempe disigitaj unu de alia, retenus multon, kio longtempe estas distingajo de iliaj metodoj de adoro kaj diservo. Estas per riĉa diverseco de vivado kaj dediĉo ke la unueco de la tuta kunuleco plenumiĝos.

5. Tio ĉi necesigas aventuron de bonvolo, kaj, eĉ plimulte, de fido, ĉar oni bezonas nenion malpei ol novan eltrovon de la kreantaj rimedoj de Dio. Al tiu ĉi aventuro, ni konvinkiĝas, Dio mem vokas ĉiun anon de sia Eklezio.

6. Ni kredas, ke oni trovos nepra al la videbla unueco de la Eklezio tutkoran akcepton de: —

La Sankta Skribo, kiel registrolibro de la sinmalkaŝado de Dio al la homo, kaj kiel la regularo kaj ĉiosuperanta normo de la fido; kaj la Kredaĵo ĝenerale nomata la Nikaja, kiel sufiĉa esprimaĵo de

la kristana fido; kaj la lastnomita aŭ la Apostola Kredaĵo, kiel bapta kredkonfeso;

La die starigitaj sakramentoj, la Bapto kaj la Sankta Komunio, kiel esprimantaj por ĉiuj la komunuman vivon de la tuta konuleco en kaj kun Kristo;

Pastraro rekonata de ĉiu parto de la Eklezio, kiel havanta ne nur la internan vokon de la Spirito, sed ankaŭ la komision de Kristo kaj la aŭtoritaton de la tuta anaro.

7. Ĉu ni ne povas racie postuli, ke la Episkoparo estas la sola rimedo por provizi tian pastraron? Ne estas, ke ni eĉ momente esprimas dubon pri la spirita realeco de la pastrado de tiuj komunumoj, kiuj ne posedas la Episkoparon. Kontraŭe, ni dankeme konfesas, ke tiuj pastradoj estas evidente benitaj kaj proprigitaj de la Sankta Spirito, kiel efikaj iloj de graco. Tamen ni antaŭmetas, ke konsideroj same de la historio kiel de nuntempa sperto pravigas la postulon, kiun ni faras pro la Episkoparo. Plie, ni precipe antaŭenmetas por atento, ke ĝi estas nun, kaj pruviĝos en la estonteco, la plej bona ilo por konservi la unuecon kaj daŭrecon de la Eklezio. Tamen ni multe deziras, ke la Episkoparo ĉie funkciu laŭ reprezenta kaj konstitucia maniero, kaj ke ĝi pli vere esprimu ĉion, kio devas esti signifata rilate la vivon de la kristana familio per la titolo, Patro-en-Dio. Ja plie, ni avide antaŭen rigardas al la tago, kiam per ĝia akceptiĝo en unuigita Eklezio ni ĉiuj povos partopreni en tiu graco, kiu estas garantiita al la anoj de la tuta anaro per la apostola rito de la surmetado de manoj, kaj en la ĝojo kaj kunuleco de eŭkaristio, en kiu, kiel unu familio, ni povos kune sen ia intelekta dubo oferi al la unu Eternulo nian adoron kaj servon.

8. Ni konvinkigas, ke por ĉiuj la vere justa vojo al reunuiĝo estas laŭvoje de reciproka cedo al la konsciencoj de aliuloj. Tiucele ni, la elsendantoj de ĉi tiu alpeto, volas diri, ke ni konvinkigis, ke, se la aŭtoritatuloj de aliaj komunumoj tiel dezirus, post kontentiga aranĝo de aliaj kondiĉoj de reunuiĝo la episkopoj kaj pastroj de nia Komunumo volonte akceptus de tiuj ĉi aŭtoritatuloj iuspecan komision aŭ rekoniĝilon, kiu rekomendus nian pastraron al iliaj kongregacioj, kiel posedantan lokon propran en la unu familia vivo. Ne estas eble al ni scii kiagrade tiu ĉi propono povas esti akceptinda al tiuj, al kiuj ni prezentas ĝin. Ni nur povas diri, ke ni prezentas ĝin tute sincere, kiel signo de nia deziro, ke ĉiuj pastraroj gracdonantaj, iliaj kaj niaj, estu haveblaj por la servado de nia Sinjoro en unuigita Eklezio.

Estas nia espero, ke la sama motivo decidigus aliajn pastrojn, kiuj ne ricevis ĝin, akcepti komision per episkopa ordino, kiel havigantan al ili pastrecon tra la tuta mondo.

Pro tia agado neniu el ni povus esti rigardata kiel malkonfesanta sian antaŭan pastrecon. Dio malpermesu, ke iu malkonfesu pasintan sperton riĉan per spiritaĵoj al si mem kaj aliaj. Neniu el ni estus malhonoranta la Sanktan Spiriton de Dio, kies voko alkondukis nin al niaj diversaj pastradoj kaj kies potenco ebligis nin ilin elfari. Ni estos serĉantaj publike kaj formale aldonitan rekonigon de nova vokado al pli larĝa servado en reunuigita Eklezio, kaj estos petegantaj por ni mem la gracon kaj povon de Dio por ĝin plenumi.

9. La spirita kondukado de la Katolika Eklezio en la estontaj tagoj, kiun la mondo videble atendas, dependas de la preteco, per kiu ĉiu grupo prepariĝas por cedi proprajojn pro komuna kunuleco, komuna pastraro, kaj komuna servado al la mondo.

Ni metas ĉi tiun idealon unue kaj ĉefe antaŭ ni mem kaj nia propra anaro. Ni vokas ilin klopodi por respondi al la postuloj de nova epoko de nova vidpunkto. Al ĉiuj aliaj kristanoj, ĝis kiuj niaj vortoj povas atingi, ni sammaniere alpetas. Ni ne petas, ke iu komunumo konsentu sian absorbon en alian. Ni efektive petas, ke ĉiuj unuĝu en nova kaj granda penado por reakiri kaj vidigi al la mondo la unuecon de la korpo de Kristo, por kiu li preĝis.

El la angla lingvo tradukis SONDISTO.

LA ROMKATOLIKA FRANCA EKLEZIO.

RESUMO HISTORIA DE J. THIERCELIN.

Multriĉa estis, je la dekoka jarcento, la franca Ekleziularo, kiam okazis la famaj malordoj, kiuj alieciĝis tiomajn aĵojn en Eŭropo. En la nokto de la 4a. de Aŭgusto, 1789, la Pastraro, samtempe kiam la Nobelaro, forlasis grandanime siajn multajn privilegiojn. Tamen, sekve de la propono de *Talleyrand*, la Episkopo de *Aŭtun*, la kunsidantaro voĉdonis la konfiskon de la ekleziaj proprajoj. »Ĉiuj ekleziaj proprajoj estas disponigotaj al la Nacio, kün la kondiĉo, ke la Nacio dece prizorgu la kultajn elspezojn, la subtenadon de kultministroj, kaj la senpezigon de mizeruloj.» Tio estas la deveno de la franca kultbudĝeto: Ĉi tio estis nur justa kaj eĉ tre malgranda monkompensaĵo, ne salajro.

Multe doloris la Eklezio dum tiuj jaroj, ĝis la Konsulregado de *Napoleon Bonaparte*, en 1799. Tiu intencis komenci la religian pacigon. Tiucele, kontrakto kun Romo ŝajnis al la Unua Konsulo la sola pero por solvi laŭkanone kaj laŭleĝe la problemon. Post malfacilaj traktadoj, fine estis suskribita la Kontrakto (francilingve: *Concordat*) en *Paris*, la 16an de Julio, kaj en Romo la 15an de Aŭgusto, 1801, kies jen la ĉefaj paragrafoj: La katolika kulto, kiu estas la religio de la plimultaj francoj, kaj de la Konsuloj, estos libera kaj publika. La Registaro elektos la ĉefepiskopojn kaj la episkopojn; sed la Papo donos la laŭkanonan investituron. — Ĉiuj preĝejoj nevenditaj estos disponigitaj al la episkopoj. — La ekleziaj havaĵoj venditaj depost la Revolucio ne estos depostulataj. — Kun la devigo, ke la Registaro dece prizorgu la pastraran vivtenon. — Al tiu ĉi Kontrakto oni almetis kelkajn aliajn paragrafojn, (Konstituciaj Paragrafoj), kiujn cetere la Papeco neniam konsentis.

Tio estis la oficiala regularo de la francaj eklezioj (ĉar la Kontrakto estis ankaŭ uzata, kiel eble, por protestantoj kaj judoj), ĝis la rompo, en 1905.

Depost 1876, la malamikemo kontraŭ la Eklezion, jam pli aŭ malpli precize en la regaj sferoj, kreskegis kaj superregis ĉe la Parlamento. Krom tio, potenca estis la influo de la framasonoj: elpelo de la Jesuitoj (1880); «elpurigo» de la juĝistaro kaj de la militistaro; laikigo de la unuagrada Instruado kaj de la Malsanulejoj (1882, 1883); restarigo de la eksedziĝo (1884); milita servo devigata je la ekleziuloj (1889); forigo de la militaj kaj maraj kapelpastroj; forigo de la oficiala funebro je la Granda Vendredo (1900); supermezura kaj maljusta leĝo pri la Kongregacioj (1903); memvole necesigita ekzilo de la gemonanoj; forigo de la krucifiksoj el la tribunaloj (1903); forigo de la franca Ambasado je la Papregado (1904). — «Tiuj ĉi dekretoj, kaj ankaŭ aliaj, kiuj grade malkunigis efektive la Eklezion de la Regno, estis nur direktaj palisetoj, antaŭpreparataj por atingi la plenan kaj oficialan malkunigon: la iniciatintoj mem ne ŝanceliĝas tion arogante kaj multfoje konfesi.» (Pio X, Rondletero *«Vehementer»*).

Kaj tamen Leono XIII, en 1892, estis provinta la pacigon per fama letero. Tia estis la situacio, ke multaj eĉ katolikoj deziregis absolutan solvon, kiu eble elkatenuis la Eklezion.

Ja la Deputitoj, la 9an de Decembro 1905, voĉdonis la ekstermon de la Kultbudĝeto kaj la nuligon de la Napoleon'a Kontrakto, «ne

dirinte eĉ solan vorton al la Regno, kune kun kiu Francujo tion estis subskribinta.» (Kardinalo *Mathieu*).

Sekve de tiu ĉi leĝo, la ekleziaj posedaĵoj estis trairontaj al Kultur-Asocioj» (franclingve: *Associations Cultuelles*) sub la regulado de la Leĝoj. Okaze de manko de tiuj, ili estus konsiderotaj, kiel senmastraj havaĵoj. Oni scias la fariĝojn: solaj la Protestantoj kaj la Judoj, neembarasataj de la rangogradaraj reguloj, konsentis pri la nova leĝo. Kontraŭe, ne povis akcepti, kaj sekve ne akceptis, la Papo tian reguligon. La 11an. de Februaro, 1906, eliĝis la Rondletero »*Vehementer nos*», kiu malaprobis la leĝon »kiel grave ofendan al la nobleco de la apostola Seĝo, al ni mem, al la Episkoparo, al la Ekleziularo, al ĉiuj francaj Katolikoj». La 10an. de Aŭgusto de la sama jaro Pio X malpermesis kreon de Kult-Asocioj, »pro tio ke ne estos certigite, certe ne laŭleĝe, ke la dia Eklezi-regularo kaj la neŝanĝeblaj rajtoj de la Papo kaj la Episkopoj estus nepre sendanĝeraj. Permesi la kontraŭan ni ne povos, sen negardo pri la sankteco de nia oficio, kaj ni okazigus la ruinigon de la Franca Eklezio». (Pio X, Rondletero »*Gravissimo*«.).

Malgraŭ tre multaj ĉikanaj, iafoje malhumane faritaj »Inventaroj», ridindaj procesoj kaj elpeloj (1906), malgraŭ la esperoj de la Registaro, ĉiu Ekleziularo, krom malmultaj, neŝatindaj, mokindigitaj esceptoj, kuraĝe obeis la papan regulon. Ĉiuj plivolvis seniĝi je iliaj rajtaj bonaĵoj, kaj mizere vivi ol malobei. Fariĝis eĉ iom multe da bedaŭrindaj okazetoj, precipe en la piegulaĵaj regionoj. Tamen kvazaŭ bankrotis la leĝo, la registaro estis longtempe trompata, kaj praktike devis ofte cedi kaj ŝajne ignori (1907).

La Eklezio perdis ĝiajn riĉaĵojn, sed gajnis pligrandajn rajtojn devenantajn de la libereco. La Katolikoj anstataŭigis la Kultbudĝeton per la malavara »Kultkotizaĵo» (franclingve: *Tenier du Culte*). Ambaŭ regadoj vivis flanke eĉ flanko, reciproke sin ignorante kaj, iafoje kontraŭbatalante.

Tiamaniere oni vivis ĝis la lasta milito. Pro la komuna danĝero, de post la unua momento, ĉiuflanke oni predikis, kaj, mirinde efektividigis la »Sanktan Unuecon». En la gravaj okazoj (pruntoj, riskoj, k.t.p.), la Registaro ne ŝanceliĝis peti helpon de la episkopoj. Tiuj ĉi ĉiam kaj ĉiel favoris la ŝtatajn entreprenojn kaj la patriotan movadon,

Komence, oni restarigis la militkapelpastrojn. Plie oni komprenis, ke estus neeble denove ekzili tiom da monaĥoj, kiuj, el eksterlandoj, ĉiuj revenis neŝanceliĝante por plenumi militdevon. Bezone ankaŭ estis ofte aŭdigi en Romo la francan voĉon kaj senton. Pro la manko de oficiala agento, oni necese turnis sin al aliaj landoj, aŭ al duonoficialuloj. Ceteré pluraj nacioj (interalie Britujo) estis enoficigantaj delegitojn ĉe la Papo. Krom tio, la reunuigo de Alsacio al la antaŭa patrujo, (ĉar tie estis ankaŭ efektiva la Napoleon'a Kontrakto). La francaj orientlandoj devigus, frue aŭ malfrue, interparoladojn. Oni tion ĝuste komprenis. Malgraŭ iomaj tropartiulaj aŭ kalumniantaj kontraŭagadoj, diskreta agitado kondukigis. Eksterordinaraj senditaroj estis senditaj. Oni uzis konvene la episkopajn servojn. Oni intencis (en Marto 1920) la restarigon de la oficiala Senditaro. Okaze de la Sanktdeklaro de nacia heroino, Johanino d' Arc en Majo, oficialaj delegitoj, kies ĉefo estis S-ro C. *Hanotaux*, la multmerita Akademiano, ĉeestis la ceremonion, flanke de la francaj kardinaloj kaj episkopoj. Oni profitis el la okazo por la unuaj ekstraktadoj. Baldaŭ Kardinalo *Dubois*, la Ĉefepiskopo de *Rouen*, sur ŝtata ŝipo kune kun multaj generaloj kaj ŝtatoficistoj entreprenis, komisie de la Registaro, rondiran vojaĝon en Orientlandojn.

Ĉu ne la ekstraktado estas interrompita? Ĉu ne, pliguste, subite malfacilaĵoj kelkaj aperis? Ĉiasupoze, la franca Senato rifuzis la necesajn kreditojn por la restarigo de la Ambasado (en Aŭgusto 1920). Denove ili deklaras sian opinion post la rekomenco de kunsidoj; kaj, sendube, favora estos ilia decido. Cetero la enoficigo de Kardinalo *Dubois* al la Parisa Ĉefepiskopofico, post la morto de ĉie kaj rajte bedaŭrata Kardinalo *Amette*, faciligos la akordon, favore al la plej granda profito de la Franca Katolika Eklezio, kaj de la religia paco.

»Kion ni estos gajnontaj? Favoran solvon de la problemoj, kiuj okazis en Alsacio, Maroko, Orientlandaro, Ĉinio, Misilandoj; kreskon de la franca influo per la katolika agado; konfirmon de la unueco, kiun la milito starigis inter ĉiuj franeoj; pli plenan kaj koran aliĝon de la katolikoj al la franca politikregimo . . . tiel multe da tre efektivaĵoj utiloj. Ni kuraĝu tion diri: per la repacigo, dekon gajnas la Papo, sed ni gajnas centon.» (*A. Bandrillart*. Akademiano. Direktoro de la Katolika Parisa Instruistaro.)

LA NASKIGO DE VÄJNÄMÖJNEN KAJ LA KREO DE LA MONDO.

LAŬ Kalevala.

KALEVALA estas la finna nacia epopeo, kiun D-ro Elio LÖNNROT kolektis el malnovaj runoj 1835. Aperinte ĝi tuj vekis grandan intereson kaj miregon eksterlande kaj ĝin oni tradukis je multaj fremdaj lingvoj. KALEVALA, priskribante bele kaj ĝuste estintajn finnajn manierojn, religion kaj ĉiusepecan vivon, estas komparata nur kun Homero. — La jena, la unua kanto de KALEVALA, rakontas kiel naskiĝis la granda kantisto VÄJNÄMÖJNEN kaj kiel oni kreis la mondon. NOTO DE LA TRADUKINTO.)

Mi aŭdis, ke oni kantis ĉitiumaniere: Sole ĉe ni noktigas, sole tagiĝas; sole naskiĝis *Väjnämöjnen*, la granda kantisto, naskiĝis el sia patrino Aerino (*Ilmatar*):

Estis virgino, aera knabino, kiu vivadis ĉasta sian tutan aĝon sur la longaj kortoj de la Aero.

Sed ŝi enuiĝis ĉiam sole estante kaj virgine estante.

Jam ŝi ekpaŝis suben sur la ondojn de l'maro. Venis granda ventpŭŝego; ĝi la maron ondigis.

La vento lulis la virginon, la ondoj puŝis la fraŭlinon tra la blua maro: la vento kaj la maro gravedigis ŝin.

Ŝi portis gravedan uteron sep jarojn, sed ne naskiĝis la feto.

Ploradis ŝi kaj tiel diris: »Ve al miaj tagoj, ve al mi misera! Kien mi venis: eterne sub aeron, por ke estu lulata de l'vento sur tiuj vastaj akvoj!

»Pli bone estis kiel virgino de la Aero vivadi ol nuntempe kiel patrino sur akvo ruliĝadi: malvarme tie ĉi estas, tre turmente tremi sur akvo, loĝi en ondoj.

»O Patro, Supra Dio, kiu la aeron apogas! Venu ĉi tien bezonata kaj alvokata! Liberigu la fraŭlinon de la embaraso kaj la uterdoloro! Rapide venu, plej baldaŭ vin oni bezonas!»

Pasis mallonga tempo. Venis aglo flugante kaj serĉis lokon, kie neston konstrui.

Ĝi flugadas kaj pripensas: »Ĉu mi nestkonstruu en aero aŭ sur akvo? Vento falpuŝigos mian neston kaj ondo ĝin pereigos».

Tiam la virgino sur la ondoj levis sian genuon el akvo por nesto.

La aglo traflugadis kaj observis la genuon. Ĝi supozis ĝin freŝa herbetaĵo.

Ĉirkaŭflugadas ĝi kaj malaltiĝas sur la genuon. Sur tiu ĝi konstruis sian neston, demetis siajn orajn ovojn: ses orajn ovojn kaj la sepan sentaŭgan ovon.

Komencis kovadi la ovojn, varmigi la genuon. Kovadis ĝi unu tagon, du, tri tagojn. Jam la virgino sentis, ke la genuo varmigiĝas; opiniis ŝi, ke la genuo en fajro estas.

Ŝi ekstremigis la genuon: la ovoj ekruliĝis en akvon kaj disrompiĝis. Ne estis sentaŭgaj la ovoj. Fariĝis la pecetoj bonaj: la suba flanko de l'ovo—tero, la supra flanko—supera ĉielo; la supra flanko de l'flavruĝo—suno, la supra flanko de l'blanko—luno; kio estis en la ovo diverskolora, tio fariĝis steloj sur la ĉielo; kio estis nigreta, tio nuboj.

La tempoj plu pasas, dum la novaj suno kaj luno brilas. Plu naĝas la aera patrino sur la vastaj ondoj.

Jam en la naŭa jaro ŝi levis sian kapon el akvo. Ŝi komencis fari kreaĵojn sur la maro.

Kie ŝi ekturnis sian manon, tie fariĝis kaboj; kie piedpremis, tie fariĝis fiŝkavoj.

Kie ŝi flanke turniĝis, tie fariĝis bordoj; kie ŝi turnis la piedojn kontraŭ la bordo, tie fariĝis salmkaptejoj; kie ŝi turnis la kapon kontraŭ la bordo, tie fariĝis riveroj.

Naĝis ŝi pli malproksime de la bordo kaj haltis sur la marvastaĵo: kreis rifojn por pereigo al ŝipoj.

Jam estis ĉio ĉi kreita; sed ankoraŭ ne naskiĝis *Vājnāmōjnen*, la granda kantisto.

La maljuna *Vājnāmōjnen* estis portata en la utero de sia patrino tridek somerojn sur la ondoj.

Priopiniis kaj pripensis li, kiel estadi en sia malluma loĝejo, kien vidiĝis nek la luno, nek la suno.

Ll diris tiel: »Suno kaj luno, vi montru al mi la vojon el tiu ĉi mallarĝa estejeto! Vi konduku min por rigardi la lunon kaj miregi la sunon!«

Sed kiam la luno kaj la suno lin ne obeis, li ekkoleriĝis: forskuis li la pordegon de l'kastelo per sia fingreto.

Kaj ekfalis li en akvon kaj tie restis.

Naĝis li kvin jarojn ,ses, sep, ok jarojn. Fine haltis li ĉe sennoma kabo kaj senarba.

Altigis li piede sur la teron por la lunon rigardi kaj la sunon miregi.
Tia estis la naskiĝo de V ä j n ä m ö j n e n la granda kantisto —
la naskiĝo el la aera patrino.

El la finna lingvo tradukis V. A. RANTALA.

GASTAJ SNOBOJ.

[*El la „BOOK OF SNOBS“ de WILLIAM MAKEPEACE
THACKERAY (1811—1863).*

*(La angla vorto SNOB havas signifon, kiun oni ne trovas en
iu oficialigita Esperanta radiko. Laŭ la aŭtoro THACKERAY, ĝia
signifo estas „TIU, KIU MALNOBLE ADMIRAS MALNOBLAĴOJN“.
Lia aplikado de la termino estas elmontrata el la jena ĉerpaĝo el
la „LIBRO PRI SNOBOJ“. NOTO DE LA TRAD. *)*

En Anglujo Gastigaj Snoboj okupas tre gravan lokon en la socio,
kaj grandega estas la tasko ilin priskribi. Iam en mia vivo, la konscio,
ke mi estis manĝinta salon ĉe iu homo, mutigis min pri liaj malindaj
emoj, kaj mi opiniis hontinda ago kaj insulto al gastameco paroli mal-
bonon pri li.

Sed kial devus blindigi min teleru da ŝafajo, aŭ rombfiŝo kaj
omara saŭco por ĉiam fermi mian buŝon? Plimaljuniĝante, oni vidas
pli klare siajn devojn. Mi jam ne estas trompebla per tranĉaĵo da
cervaĵo, kiel ajn grasa; kaj rilate al muteco pro rombfiŝo kaj omara
saŭco — kompreneble mi estas muta; la ĝentilaj moroj postulas, ke
mi tia estu, ĝis kiam mi estos glutinta la kunmiksaĵon—sed ne poste;
tuj kiam la viandoj estas formanĝitaj, kaj Johano forprenas la teleron,
mia lango komencas sin movi. Ĉu ne via, se vi havas agrablan proksi-
mulon?—ekzemple, belulinon, ĉirkaŭ tridekkvinjaran, kies filinoj
ankoraŭ ne tute forlasis la lernejon—tiuj estas la plej bonaj kunparol-
antoj. Rilate al la junaj fraŭlinoj, ili estas lokitaj ĉirkaŭ la tablo nur
por esti rigardataj—simile al la floroj en la centra vazaro. Ilia ruĝi-
ĝema juneco kaj natura modesteco malpermesas al ili tiun facilan,
intiman, interparolan malrigidecon, kiu faras la ĉarmon de la inter-
komuniko kun iliaj karaj patrinoj. Estas al tiuj ĉi ke la Gasta Snobo
devas sin turni, se li volas sukcesi en sia metio. Se oni sidas apud unu
el tiuj ĉi, kiel agrable estas, en la intertempoj de la festeno, efektive
insulti la manĝaĵojn kaj la gastigantojn! Duoble pike estas moki
homon eĉ antaŭ lia nazo.

«Kio efektive estas Gastiga Snobo?» eble demandas iu naiva

**) Ŝajnas al ni, ke nova radiko ne estas necesa; „ĝentilaĉulo“ aŭ
alia simila vorto (formebla el ekzistantaj Esperantaj radikoj) povas
sufiĉe reprezenti la signifon de la vorto SNOB laŭ ĝiaj diversaj
nuancoj. — REDAK.*

junulo, kies monda kono ne estas vasta—aŭ tiu simplanima leganto, kiu ne profitis el Londona spertado.

Mia kara sinjoro, mi montros al vi —ne ĉiujn, car tio estas neebla—sed diversajn specojn de Gastigaj Snoboj. Ekzemple, supozu ke vi, en la meza rango de la socio, kutimiĝinta al ŝafaĵo, rostita je mardo, malvarma je merkredo, spicmiksita je ĵaŭdo, k.c., kun malmulte da mono kaj malgranda mastrumado, elektas malŝpari la unuan kaj renversi la duan, farante festenojn nenature multekostajn, vi tuj eniras en la klason de la Gastigaj Snoboj. Supozu, ke vi havigas mal-karajn manĝaĵojn de la kukvendisto, kaj dungas duon da legomvendistoj aŭ tapiŝbatistoj, por paradi kiel lakeoj, forsendante naivan Manjon, kiu ĉetoble servas al vi en ordinaraj tagoj, kaj ornamante vian tablon (kiu kutime surhavas fajencon kun la konata salika desegno), per senvalora arĝentumita metalaĵo. Supozu, ke vi ŝajnis estas pli riĉa aŭ pli grandioza ol vi devus esti—vi estas Gastiga Snobo. Kaj, ho, mi tremas, pensante kiel multaj, multegaj tiaj legos ĉi tion!

Homo kiu tiamaniere gastigas—kaj ve, kiel malmultaj ne faros ĉi tion—similas al tiu, kiu volus pruntepreni la veston de sia najbaro por sin montri fanfarone, aŭ al sinjorino, kiu paradas en la diamantoj el la apuda domo,—ĉarlatano, unuvorte, kaj inter la Snoboj oni devas kalkuli lin. Homo, kiu forlasas sian naturan sferon por inviti nobelojn, generalojn, aldermanojn, kaj aliajn modulojn, sed estas tro-ŝparema ĉe gastigo al siaj egaluloj, estas Gastiga Snobo. Mia kara amiko, Joĉjo Klastas, ekzemple, konas *unu* nobelon, kiun li renkontis en marbordejo: maljunan Lordon Maĉet, kiu estas sendenta kiel trimonata infaneto, kaj silenta kiel enterigisto, kaj malsprita kiel—nu, ni ne difinu. Nuntempe je ĉiu festeno ĉe Klastas oni vidas tiun seriozan maljunan sendentan patricion dekstre de S-ino Klastas—Klastas estas Castiga Snobo.

Maljuna Hapat, maljuna Piksaŭc, maljuna Peklo, la Orient-hinda Direktoro, maljuna Tranĉ, la ĥirurgo, k.c.—tiu societo da maljunaj naivuloj, kiuj konstante sin invitas reciproke al festenoj, kaj gastas nur pro la motivo supersatigi sin—tiuj, ankaŭ, estas Gastigaj Snoboj.

Plue, mia amikino Lordino Troŝpar, kiu havas ĉirkaŭ la tablo tri gigantajn puntornamitajn lakeojn, kaj provizas fipecon da ŝafaĵo sur arĝenta plado, kaj gutverŝas por vi malbonan ŝereon aŭ portvinon laŭ plenfingringoj, estas Gastiga Snobo alispeca; kaj mialflanke mi konfesas, ke mi preferas manĝi ĉe maljuna Hapat aŭ maljuna Piksaŭc ol ĉe ŝia Lordino Moŝto.

Ŝparegemo estas snoba. Parado estas snoba. Tro granda superfluo estas snoba. Klastasado*) estas snoba. Sed mi konfesas, ke ekzistas personoj pli snobaj ol tiuj, kies neperfektaĵoj estas supre cititaj; nome, tiuj individuoj kiuj povas, kaj tute ne gastigas. La negast-

Klastasado. Penado konatiĝi kun nobeloj, kiuj portas klastojn sur la ĉapeloj.

amulo neniam sidu ĉe tablo kun mi. La avara mizerulo iru kaj solece maĉu sian oston!

Kio do estas vera gastameco? Ve, miaj karaj amikoj kaj kun-snoboĵoj! kiel malmulte da ĝi oni trovas fine! Ĉu la motivoj estas puraj, pro kiuj viaj amikoj vin invitas al festeno? Tio ofte venis al mi en la kapon. Ĉu via gastiganto deziras ion de vi? Ekzemple, mi ne estas suspektema; sed ja estas fakto, ke kiam Ruz publikigas novan verkon, li invitas al festeno ĉiujn kritikistojn; ke kiam Vulp havas preta por la Ekspozicio sian pentraĵon, li iel fariĝas treege gastama, kaj invitas siajn ĵurnalistajn amikojn al senparada kotleto kaj glaso da vino. Maljuna Monam, la avarulo, kiu mortis antaŭ nelonge (testamentinte al sia mastrumistino sian monon) vivis multajn jarojn je la plej alt-valoraj frandaĵoj, nur per tio, ke li skribe notadis, ĉe ĉiuj siaj amikoj, la nomojn kaj antaŭnomojn *de ĉiuj la infanoj*. Sed kvankam vi eble havas vian propran opinion pri la gastameco de viaj konatuloj; kaj kvankam tiuj, kiuj vin invitas pro avaraj motivoj, estas plej certe Gastigaj Snoboĵoj, estas bone ne tro precize enketi pri iliaj motivoj. Ne estu tro scivola pri la buŝo de donacita ĉevalo. Malgraŭ ĉio, viro ne intencas vin insulti, invitante vin al festeno.

Nu, tiurilate, mi konas kelkajn modulojn kiuj efektive konsideras sin vunditaj, kaj insultitaj se la manĝaĵo kaj la gastaro ne plaĉas al ili. Jen Filistro, kiu ĉe si manĝas ŝilingan porcion da bovaĵo el kuk-butiko, sed se oni invitas lin manĝi en domo kie ne estas pizoj en la fino de Majo, au kukumoj en Marto kune kun la rombiŝo, opinias la inviton insulto. »Kion», li diras, »kion je la diablo intencas la Forkeroj, invitante *min* al familia manĝo? Mi povas havigi ŝafaĵon ĉe mi»; aŭ, »Kia infera impertinenteco flanko de la Kuleroj akiri viandojn de la kukisto, kaj imagi ke *mi* estas trompebla per iliaj rakontoj pri ilia franca kuiristo!» Kaj jen Joĉjo Pudinga — mi vidis tiun honestulon tute koleregan je unu tago, ĉar okaze Siro Johano Tranĉo invitis lin renkonti tiun saman gastaron, kiun li renkontis ĉe Kolonelo Satego la antaŭan tagon, kaj li ne estis preparinta novan serion da rakontoj por amuzi ilin. Kompatindaj Gastigaj Snoboĵoj! vi ne scias kiel malmulte da danko vi ricevas por via tuta penado kaj elspezo! Kiel ni Gastaj Snoboĵoj mokas vian kuirfaĵon, kaj malestimas vian malnovan vinon, kaj estas nekredemaj pri via ĉampano po kvar ŝilingoj kaj ses pencoĵoj por botelo, kaj scias ke ekstramanĝaĵoj hodiaŭaj estas revarmigataj el la viandoj hieraŭaj, kaj rimarkas kiel iuj pladoj estas netuŝite forkaptitaj de la tablo, por ke ili povu aperi je la morgaŭa festo. Mi-aflanke, kiam ajn mi vidas la ĉeflakeon speciale deziranta forĵongli fritajon aŭ blankmanĝon, mi ĉiam elvokas, kaj insistas ĝin ruiniĝi per kulero. Tia konduto popularigas *min* ĉe la Gastiga Snobo. Unu amiko mia, kiel mi scias, faris grandegan impreson en alta socio anoncante rilate al iuj manĝaĵoj al li proponitaj, ke li neniam manĝas viandgelatenon krom ĉe Lordo Titup, kaj ke la kuiristo de Lordino Ĝimini estas la sola viro en Londono kiu scias kuiri serpentan lumb-aĵon, aŭ kokaĵon kun trufoj.

El la angla lingvo tradukis LUISE BRIGGS.



KRONIKO DE LA EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO.

(A) ĜENERALA.

NOVAJ LIGANOJ, kiujn ni tutkore bonvenigas: Frederick George Ackertley, M. A. Presbitero (*Grindleton*); E. Bell (*London, N.*); Bruce Bennett (*London, S.O.*); F-ino E. F. Carter (*Belfast*); Eileen de B. Daly (*Bordighera, Italujo*); George H. Fracker, A. M., D. Teol., Presbitero (*Storm*

Lake, Iowa); Adam Furmanik, Mariavita Presbitero de la Malnovkatolika Ekl., Paroĥestro de *Leszno, Polujo*; Victor Alexander Palmer Hayman, B.A., Presbitero (*London, Ok.*); Johano Perriard (*Cortailod, Svisujo*), *J. Thiercelin*, Presbitero (*Nemours, Francujo*); Joshua Viliesid (*London, O.C.*).

(B) LINGVA KOMITATO EKLEZIA, (L. K. E.)

ROMKATOLIKA TEKSTO DE
PREĜOJ.

(*Presita por komparo kun anglikanaj tekstoj.*)

Antaŭ la 6a. kongreso de I.K. U.E. speciala komisio en Hago pristudis la tradukojn de la ĉefaj katolikaj preĝoj, por unuecigo, kaj fiksas tekstojn, kiuj dum kunsido la 11an de Aŭg. 1920, estis akceptataj de la ĉeestantoj. Jen la elektitaj tekstoj:

LA KATOLIKA SALUTO.

Laŭdata estu Jesuo-Kristo. En eternecon. Amen.

LA FORMULO POR LA KRUCOSIGNO.

En la nomo de la Patro, kaj de la Filo, kaj de la Spirito Sankta.

PATRONIA,

kiu estas en la ĉieloj, sanktigata estu nomo via. Alvenu regno via. Fariĝu volo via, kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ. Kaj pardonu al ni ofendojn niajn,

kiel ankaŭ ni pardonas al ofendintoj niaj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Amen.

SALUTON, MARIO,

gracoplena; la Sinjoro estas kun vi: benata vi estas inter la virinoj, kaj benata estas la frukto de via korpo, Jesuo. Sankta Mario, Dipatrino, preĝu por ni pekuloj, nun kaj en la horo de nia morto. Amen.

MI KREDAS

je Dio, la Patro ĉiopova, kreinto de la ĉielo kaj de la tero. Kaj je Jesuo-Kristo, lia unusola Filo, Sinjoro nia: kiu estas konceptiita de la Spirito Sankta, naskita el Mario, la virgulino, suferinta sub Poncio Pilato, krucumita, mortinta, kaj entombigita: li malsupreniris al inferoj; la trian tagon reviviĝis el la mortintoj; supreniris ĉielon, sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova: de tie li venos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn. Mi kredas je la Spir-

ito Sankta, la sankta Eklezio katolika, la komunigo de la Sanktuloj, la pardono de la pektoj, la revivigo de la karno, la vivo eterna. Amen.

GLORO

al la Patro, kaj al la Filo, kaj al la Spirito Sankta. Kiel estas en la komenco, kaj estas nun, kaj estas ĉiam, kaj en centjarojn da centjaroj. Amen.

BIBLIOGRAFIO.

NOTO. La E. R. recenzas librojn, k. c., kondice ke oni donace alsendas du ekzemplerojn.

(A) INTERNACILINGVAJ VERKOJ

KRISTANA KANTARETO KAJ ORDO DE DISERVO LAŬ LA FINNA EKLEZIA MANLIBRO; verkitaj de diversaj personoj; eld. de la Redakcio de *Kristana Espero*, 1920, *Laihia*, Finnlando; 44 paĝoj, 18.2 x 12.2 cm.; prezo, 2 Fmk.

Malplenaĵo en nia esperanta literaturo komencis pleniĝi. Estas diligentaj finnaj samideanoj, de kiuj estas eldonita *Kristana Kantareto*. Ĝi enhavas 30 tradukitajn psalmojn kaj kantojn, inter kiuj multaj estas tre bonesperantigitaj; kiel N-ro 1., «Laŭdu Ni Dion, Li estas Nia Espero»; N-ro 12., «Ho Dio, Estu Via Beno»; N-ro 13., «De Reĝoj Reĝ'»; N-ro 14., «Jam Venis Tempo Varma»; N-ro 15., «La Suno Benata»; N-ro 16., «O Homo Memoru»; N-ro 25., «Hosano»; N-ro 29., «Sub La Polusstelo».

Iuj rimarkoj: En N-ro 16 staras unuvorte «porĉiama», kial ne «por ĉiam»?; en N-ro 25 (Hosano) «O» en «Filo» (de David) devas sangiĝi kontraŭ apostrofo por fariĝi kantebla. Ni povas pardoni kelke da eraroj ĉar en la «Antaŭnoto» ni legas, ke «la libreto devis fariĝi en tia mallonga tempo preta por la 6a kongreso de l'esperantistoj finnlandaj». Dank' al tia mallonga tempo

parto difektigis je rimo kaj metro *La Ordo de Diservo* estas interesa.

Ni gratulas niajn finnlandajn kunlaborantojn—kaj nin mem. La legantoj de *La Eklezia Revuo* certe aĉetos ĝin; kiel pioniro en sia speco ĝi havas hejmrjton en ĉiu biblioteko.

K. H. (Svedujo).

LA ROZUJO ĈIUMILJARA, de *Mabel Wagnalls*: tradukita de *Edward S. Payson*, Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko; 47 paĝoj, 17.3 x 12.7 cm.; Prezo. 35 cendoj.

En tiu ĉi ĉarmega verketo la konvertiĝo de artist-modelo, *Joline*, bela frivola «filino de ĝojoj», kiu el Magdaleno pekanta fariĝas Magdaleno pentanta—ŝia konvertiĝo kaj la sekvaĵo, estas tre vivŝajne kaj kortuŝe rakontita. La viveco de la unua parto, kaj la fidelaj en la dua parto priskriboj pri laborema vivo, kun la neatendita finiĝo, estas egale admirindaj. Eble la plej frapanta okazaĵo en la rakonto estas tiam, kiam Joline, forlasita sola en la Katedralo, «sidas tute senmova kaj atendas.»

La libreto estas ornamita per ŝajne tre bonaj portretoj de la verkintino kaj de la tradukinto.

En la traduko vidigas kelke da nekutimaj uzadoj, ekz., Sur p. 12, »Vi efektive neniam vidis min ludi la rolon de sanktulino», kie oni atendas »ludantan»; kaj, sur p. 14, anstantaŭ »Granville ŝin pozis» estus pli ĝuste diri »Granville ŝin pozigis»; Sur p. 41, ŝajnas ke »Dum li ŝin vidis, ame rigardante tiun rozujon» devas esti »Dum li ŝin vidis ame rigardantan»; ĉar estas nepre Joline, kiu rigardis la rozujon.

Tamen, kun tre malmultaj esceptoj, la traduko estas tre bonstila, simpla, klara, vivplena, kaj ni povas kore rekomendi al ĉiuj esperantamantoj tiun ĉi allogan bele esperantigitan romaneton.

E. O. E. L.

LA KVAKERISMO, de T. Corder Catchpool, eld. de Friends' Council for International Service, Ethelburga House, 91, Bishopsgate, London, E. C. 2; 15 paĝoj, 18.3 × 12.4 cm.; Prezo, 2 pencoj.

Tiu ĉi broŝuro prezentas interesan skizon pri la origino, signifo, kaj praktika aplikado al mondaj aferoj de la movado enkorpiĝinta en la Religion Societon de Amikoj.

Fontinte el profunda soifo al senpera interkomunikiĝo kun Dio, la Kvakera movado forrifuzis la aŭtoritaton kiel de Eklezio, tiel de Libro, kaj eĉ forlasis sakramentajn ritojn, »por ke la vualo de ekstera observo ne kaŝu la spiritan realaĵon».

La plej karaktera praktiko de la Societo estas la Kunveno por silenta adorado—silento el kiu »povas levigi paroloj de helpo aŭ de preĝo».

Kvankam ne ĉiuj povas konsenti kun la Amikoj pri ilia forri-

fuzo al la Sakramentoj, kaj al ĉia ofica pastraro, kaj pri ilia sinteniĝo rilate militon pro la patrolando, ĉiuj devas respektige konfesi iliajn konstantan lojalecon al la Interna Lumo, nelacigeblajn klopodojn pro la paco kaj sindonemajn en socia servado laborojn. Plue, la organizitaj Eklezioj jam lernis multe de ili pri la graveco de silento por adorado, kaj de pli forta konscio pri la en ĉiuj enloganta Spirito.

Pri la vortaro de tiu ĉi traktateto, kiu cetere estas bonstile verkita, oni dubos ĉu la vorto Kvietismo (p. 5.) estas ĝuste uzita; ĉar ĝi havas teknikan signifon, kiu ne tute akordiĝas kun la teksto. Sur p.p. 4, 6. »progresiva» ŝajnas nenecesa vortformo, kies signifo estas esprimita sufiĉe klare per »progesa». Preseraroj estas tre malmultaj.

E. O. E. L.

KARAKTERO, de J. M. van Slippriaan Luiscius, advokato en Hago; trad. anon.; eldonita de Akcia Soc. »Centra Esperanto-Librejo», Hago, 1920; 32 paĝoj, 18.8 × 13 cm.; Prezo fl. 0. 30.

Plej interesa traktado pri la ecoj kaj konsisteroj de bona karaktero, kaj pri la metodo formi ĝin. La verkisto nenion diras pri la religio aŭ pri ĝia influo sur karaktero; tamen, lia prezentaĵo neniel kontraŭstaras ĝin; ĝi evidente neestas de la *esse* de karaktero, kaj tial ne estas en la fako; oni povas demandi al si, Kio estas lia religio?

Dudeknaŭ proprecoj de karaktero estas prezentitaj en tre koncizaj frazoj, kiuj ofte memorigas la Sentencojn; je la fino

oni sendube diros, Tion mi relegos, kaj eble multfoje. A. L. C.

MIIM: RAKONTO PRI LA LATINA KVARTALO DUM LA MILITO. Angle verkis *J. U. Giesy*; Esperantigis *Edward S. Payson*, Prezidanto de la Esperantista Asocio de N. Ameriko; 53 paĝoj. Prezo, 1s.; Londono; Brita Esperanto Asocio, 17 Hart Street. W.C. 1. 1920.

La titolo donas ne malgrandan informon pri la enhavo de la libro. Ĝi rakontas en tre bonstila kaj leginda Esperanto la vivmanieron, la ĝojojn kaj suferojn de kelkaj anoj — viroj kaj virinoj — el la Latina Kvartalo de Parizo. Komence, la leganto eble pensos, ke la verkisto inten casprisribi la vivmanieron de la Kvartalanoj, imitante romanojn kiel la »Sapho« de *Daudet*. Tamen pliposte li konstatos, ke la simpatia priskribo ne estas nehontinda apologio por la vivmaniero de la »duon-mondo«. Li trovas la realismon kaj la idealismon kunigitajn en tiu ĉi libreto; Ĉar, per la purigilo milita, Francujo retrovas sian animon. La karakteroj de la Kvartalo konvertiĝas al la patriotismo kaj al la religio. La apaĉo faras sian konfeson al la pastro antaŭ la atako. Anstataŭ mortigi sian naskotan infanon *Mimi*, la »eta amikino« de la artisto, decidas naski ĝin — »por Francujo«. »Ĝi estas signo«, diris la eks-apaĉo, — kiam antaŭe la virinoj volis naski infanojn por la bono de Francujo?« La leciono de la libro (se estas permesate tiel nomi ĝin) vidigis en la letero, kiun la artisto sendas el la tranĉoj al *Mimi*. »Ĉi tiu militado alportis al mi kaj ankaŭ al multaj

miaj kamaradoj novan senton pri la signifo de la vivo kaj morto . . . Kaj niaj pastroj, — ĉu ŝajnas strange ke mi aludas pri niaj pastroj? nu, do vi devus vidi ilin batalantajn, ŝultron ĉe ŝultra kun ni; neniu pli kuraĝa, neniu pli milda, aŭ kun tia komprenado pri la malfortaĵoj en ni, kiuj nomas nin viroj . . . Kiam ajn estas tempo, la pastro faras meson por ni antaŭ atakego. Mi ne kompreneas la kialon; neniam antaŭe mi pensis pri ĝi . . . Mimi, mia »eta amikino«, neniu viro iam efektive vivis ĝis li lernis la grandan lecionon, kiel morti«. Tre kortuŝa estas la preĝo de la eks-apaĉo. »Dio mia, mi kredas ke vi scias, kiel multe mi amas la vivon, kaj kiel mi vivis. Se ne estas necese ke mi mortu, mi petas, ke mi eliru kun tuta haŭto. Sed se mia morto helpos Vin iamaniere, aŭ helpos Francujon, ho, mia Dio, sendu la kuglon; nur, mi petas, sendu ĝin tiel, ke la fino venos tre rapide«. »La bona pastro instruis al mi tiun preĝon, *Mimi*, mia infano; kaj mi rediras ĝin, kiam ajn mi iras por batali.«

Tiuj ĉi citaĵoj donas bonan ideon pri la stilo de tiu ĉi interesa rakonto.

W. H. HARRIS, B. Lit.

OK NOVELOJ, estantaj *The Matador of the Five Towns and other Stories*, (La Matadoro de la Kvin Urboj kaj aliaj Rakontoj) de *Arnold Bennett*, trad. de *Alfred Wackrill*, eld. de La Brita Esperanto-Asocio, (Korp.), 17, Hart St., London, 1919. Prezo, du ŝilingoj; 124 paĝoj.

La nomo de la verkisto garantias la kvaliton de la originalo

kaj tiu de la tradukisto la esperantan eldonon. Sro. *Wackrill*, ŝajnas al ni, lerte malfermas al neangloj la kutimojn kaj karakteraĵojn de mezanglujā komunumo prezentitajn de la verkisto per vivsimilaj bildoj kaj foje slangaj popolaj frazeroj. La komprenigo al alilanduloj de tiaj enlandaĵoj forte rekomendas la helplingvon. Sendube la juĝo de alilandanoj pri la sukceso aŭ malsukceso de la tradukinto multe pli valoras ol la nia.

La enhavita rakonto *Mimi* estas neniel rilata al la samtitola rakonto de *J. U. Giesy*, esperantigita de *S. Payson* kaj tiu ĉi jare eldonita ankaŭ de la Brita Esperanto-Asocio.

SONDISTO.

FAKA VORTARETO NO. I (PROVIZORA ELDONO). TERMINOJ UZATAJ EN LA FABRIKADO DE OMBRELOJ, eld. Brita Lit. kaj Debata Societo; 4 p., 18.9 × 12.1; prezo, 1 resp.-kup. afr. Ŝajnas al ni, ke tiaj »provaj vortaretoj» ne havas multe da valoro. Nepre necesa al la efika, grava uzado de la L.I. en la Komerco, la Scienco, k.c., estas eldono de teknikaj vortaroj verkitaj de centraj aŭtoritatoj en ĉiu fako. Ĉu rilate gravan fakon, ĉu negravan, tiun laboron devas organizi aŭ la regnestro (kunlaborantoj), aŭ ĉie konata, internacia Esperantista asocio posedanta la plenan aŭtoritaton de la Esperantistaro; kaj nepre devas verki la vortarojn (ne vortaretojn) komitatoj de spertuloj elektitaj el la korporacioj koncernataj. Oni cirkuligu la provaĵojn inter fakuloj pere de la Delegitoj de

U.E.A., k.c. private, aŭ uzadu la gazetojn samcele; nur vere utilajn pli malpli kompletajn vortarojn oni porvende eldonu. —A. J. A.

EL LA PROKSIMA ORIENTO (DE UKRAJNIO ĜIS GEORGIO) kun etnografia Karto; de *Ivan H. Krestanov*; eld. Esp.-Oficejo en *Pirdop*, Bulgarujo; Bulg. Esperanto-Biblioteko, Serio 2, N-o 2; 68 paĝoj, 20.6 × 13.8 cm.; prezo, Fr. 2.50.

Tiu ĉi libro pritraktas la ok malgrandajn naciojn antaŭ ne longe ampleksitajn per la Rusa Imperio. La titolo estas iom neĝusta, ĉar la verkisto kondukas nin de Finnlando en la Nordo ĝis Georgujo en la Oriento kaj laŭ tiu geografia ordo la Ukrainoj estas proksimume duonvoje. Alie ni havas nenion krom laŭdo por la klara kaj plena informo, kiun la verkisto pakis en la 68 paĝojn.

Bone estas ke S-ro *Krestanov* rememorigas nin, ke la rusa literaturo multe ŝuldas al iuj el ĉi tiuj plimalgrandaj popoloj. Tiel tipa verkisto kiel *Gogol*, kies komedio »*Revizor*» estas bone konata, kaj kies belaj »*Meditadoj pri la Dia Liturgio*» meritas esti bone konata, estis ukrainia; eĉ kiel la poeto *Lermontoff* estis skotdevena. Tamen estas kredito al la rusa Literaturo, ke tiaspecaj viroj altiriĝis en la fludon kaj pligrandigis la fluegon de literatura arto, kiu unuiĝis per la uzado de la rusa kiel komuna lingvo.

Restas tamen impona listo de vere unuaklasaj verkistoj, kies esprimo ne estas la rusa sed unu

aŭ alia el la lingvoj parolata de la popoloj pri kiuj S-ro Krestanov skribas: popoloj de finna-ugria kaj de letona-litova deveno, kun aliaj de kaŭkaza raso aŭ lingvo. Al la granda plimulto la kampo tie ĉi malkovrita estas neesplorita teritorio; kaj eĉ la nomoj de la lingvoj estas nekonataj. Ni ne pretendas, ke ni esploris la tutan regionon, kiun S-ro Krestanov priskribis por ni; sed ni povas senhezite rekomendi ĉi tiun verketon pro la ĝusteco kaj kompleteco de la informo pri tiuj partoj de la regiono, kiujn ni pli intime konas. De nun en Letonujo, pro la sendependiĝo de tiu ŝtato, ni povas atendi la kreskadon de indiĝena literaturo pli grava ol la ĝisnuna. »La nombro de verkistoj,—poetoj, prozistoj, kritikistoj, politikverkistoj—estas vere eksterordinara». Se ĉi tiuj verkistoj produktos sufiĉe da originalaj verkoj por superi la preskaŭ tro multenombrajn tradukaĵojn de anglaj verkoj kaj la pecetajn, ofte senzorge verkitajn gazetartikolojn, kiuj preskaŭ tute okupis la letonan gazetaron, ni povas kun certeco atendi la alvenon de nova kaj vivplena literaturo.

Aliflanke troviĝas Georgujo havanta lingvon en kiu siblaj literoj estas tiel multenombraj ke *Sir Harry Johnstone* (famonata angla esploristo, k.c.) nomas ĝin »kolera-kata konsonanta lingvo», kun malbela amasigo de konsonantoj, sed kun eksterordinare klariga gramatika formo. Tie ĉi la kvanto da indiĝenaj verkoj, krom multaj unuaklasaj tradukaĵoj, estas abunda kaj la produktaĵoj estas

markitaj per granda artista merito. Per lirika poezio la georgaj verkistoj nuntempaj superas; kaj esperinde estas, ke oni tradukos multe da ties verkoj en Esperanton, por ke la mondo estu pliriĉigita per la beleco kaj muziko, kiuj nun serĉas elirejon per neordinara kaj akresona lingvo. Tiuĉirilate, kiel aliflake, EL LA PROKSIMA ORIENTO estas tute fidinda gvidilo, enhavante informon, malfacile trovatan en la ordinaraj informolibroj.

La granda, faldita landkarto ĉe la librofinaĵo estas precipe utila kaj kleriga.—FRED. G. ACKERLEY.

KRISTO KAJ LA LIGO DE LA NACIOJ; BENEDIKTO 15A. PRI LA KRISTANA PROGRAMO; eld. (kun aprobo de la episkopa ordinariato) Paŭlus-eldonejo de la Blanka Kruco, 1920, *Graz*; 16 paĝoj+kovr., 16.7×12.1 cm.; prezo ne montrita kvankam oni notas, ke la profito servas al la subteno de la katolika pacmovado.

Tia proklamo farita de la estro de unu el la plej gravaj kaj grandaj eroj en la Eklezio de Kristo estas nepre konsiderenda en ĉiu alia Ekleziero tra la mondo. Ĉiuflanke en la Eklezio foriĝu la antaŭjuĝo kaj la blindigaj influoj de la fiereco, la politiko, la rememorado de reciprokaj maljustaĵoj kaj eraroj. Responde al tia sintenado flanke de la »Protestantoj» eĉ la Roma Eklezio, gvidate de la Sankta Spirito, sendube fariĝos pli cedema rilate la kondiĉojn starigendajn por la reunuiĝo de la Eklezioj.—LEGISTO.

(B) VERKOJ NACILINGVAJ.

NOW IS THE DAY OF JUDGMENT (JAM NUN ESTAS LA JUĜTAGO) de pastro *James Lawrenson Smilys*; eld. la Verkisto; *Annapolis, MD.*, Usono, 1920; 102 p.k. kovr., 19.2 × 13.5 cm.; prezo, 50 cendoj afr.; angle verkita.

Nuntempaj mondkondiĉoj estas granda enigmo al la popolamasoj. Tiu ĉi verko konstatas, laŭ la revelacioj de Sankta Skribo kiel interpretitaj de la verkisto, ke la mondo jam nun trapasas la finajn doloregojn de la Savado; kaj ke Dio estas fortege laboranta je sia Regno. Malkaŝe priskribinte la sistemajn pekojn de «la Civilizacio», la verkisto montras la vojon al rekonstruo radikala, revolucia, kaj profunde religia. La ĉapitrotitoloj estas sufiĉa sciigo pri la enhavo: Signoj de la Juĝtago; la Regado de Marso, la Civilizacio ĉe la Juĝotejo de Dio; La Pekoĵ de la Eklezio; Leviĝu kaj Rekonstruu la Mondon; Forigu la Krimon de la Procentego; Alprenu la Kooperan, Aŭtonomian Ŝtaton; la Okazonta Kristana Reviviĝo; Internacia Lingvo; Universala Standardo; la Pravigo kaj Pasko; la Eniro de la Mondo en la Superlernejon; (Al-donaĵo) Proponita Konstitucio por la Ligo de Nacioj.

Ĉi tiu estas sincera kaj fervora verko, kiu, ĉu ni konsentas kun la opinioj esprimitaj, aŭ ne, certe pensigaŝ nin. — LEGISTO.

WHICH SHALL IT BE? (KIU DEVOS ESTI?) de *M. C. Butler*; eld. de la Brita Esp.-Asoc., 1920; 8 p. broŝ., 18.5 × 12.3 cm.; angle; prezo, ½ penco.

Jen trafa, konvinka traktaĵo pri la problemoj de internacia

lingvo kiom koncerne la konkuradon de la angla lingvo kontraŭ Esperanto. — LEGISTO.

AU SINAI ET DANS L'ARABIE FÉTRÉE; verkis *Léon Cart*; prezo, Fr. 10. 520 paĝa volumo kun 77 bildoj kaj 12 landkartoj; francilingve. La verkisto, profesoro ĉe la Neŭĉatela Universitato skribis tiun verkon post longa vojaĝo en la supre nomita lando. La libro estas altvalora studado de la lando kie la Izraelidoj pasigis 40 jarojn. — JOHANO PERRIARD.

CATHOLIQUE OU PROTESTANT? (Ĉu katoliko, ĉu protestanto?); de *Jean Besson*; Fr. 3.50.; 340 paĝa volumo, francilingve. Taglibro de serĉanto, protestanta, supere skribita kun multe da respekto por ambaŭ religioj. — JOHANO PERRIARD.

OUTWARD BOUND (EKSTERLANDEN FORVOJAĜANTA). Ĉiumonata anglalingva revuo bele ilustrita; 100 paĝ. 17 × 24 cm.; 1 ŝ, ĉe ĉiuj gazetvendistoj.

Tiu ĉi nova unuaklasa revuo plenumas definitivan bezonon. La vidpunkto estas tutmonda kaj internacia, sed ĝi precipe rilatas al la grandaj nekristanaj regionoj de la mondo. La rakontoj, versaĵoj, priskriboj, artikoloj kaj fotografiaĵoj estas ĉiuj tre interesaj kaj pensigaj. Legante *Outward Bound* oni sentas la gravan valoron kaj utilecon de misioj. Inter la porskribantoj estas ne nur konataj britoj, sed hindoj, ĥinoj, afgano, k.a. Sume, la dirita revuo bone meritas la subtenadon de ĉiuj larganimaj kristanoj kaj aliaj bonvolemuloj. — L. A. L.

Por la propagandisto, studento de lingvoj Angla aŭ Esperanta
kaj aŭtoro de intelektaj kart-ludoj.

Angla kaj Esperanta Etimologio

ENGLISH AND ESPERANTO ETYMOLOGY

CHARLES G. STUART-MENTETH
(DISTINGA DIPLOMO DE OXFORD)

„Por encerbigi la Esperanto-radikojn tiu ĉi verketo por anglo-lingvanoj tre taŭgas. Dezirinde estas, ke tiu verko estu imitata en aliaj lingvoj. — *Svisa Espero*, Aŭg.-Sept. 1919.

„ . . . Bonega broŝuro. . . .“ — *Le Monde Espérantiste*, Aŭg.-Sept. 1919.

„Specoj de vortoj en Angla kaj Esperanta lingvoj tiamaniere aranĝitaj kaj presitaj ke elmontrigis la radikojn en ili“ (traduko). — *Amerika Esperantisto*, Sept. 1919.

„ . . . utila lernilo por atentigi la anglan publikon pri la multaj Esp. radikoj en ilia lingvo. . . .“ — *Holanda Pioniro*, Sept.-Okt. 1919.

„ . . . celas prui la naturecon kaj internaciecon de Esperanto kaj certe li bone sukcesis. . . .“ — *Esperanto* (Bahia Blanca), Okt. 1919.

„ . . . klera kaj sugestia studo . . .“ — *Esperanto* (Bern), Dec. 1919.

„Studinda broŝuro. . . .“ — *La Esperantisto* (Vieno), Dec. 1919.

„ . . . Aparte interesa estas la tabelo de Esperantaj radikvortoj en aliaj Esperantaj radikoj. . . .“ — *The British Esperantist*, p. 15, Jan. 1920.

„Post ĝia trastudado ni restas ankoraŭ pli konvinkitaj pri la granda valoro de Esperanto. . . .“ — *La Laboro* (Lisbono) Sept. 1920.

10 pencoj: 4 respond-kuponoj, afrankite

B. E. A., 17 HART STREET, LONDON, W. C. 1

ESTAS LA DEVO
DE
ĈIU BRITA ESPERANTISTO

helpi al

LA BRITA

ESPERANTO-ASOCIO

Kaj tiel fortigi la Movadon en la
Brita Imperio

Prospekto senpage ĉe la B. E. A.

Adreso: LA SEKRETARIO DE LA BRITA
ESPERANTO-ASOCIO 17 HART STREET,
LONDON, W. C. 1

LA KVAKERISMO

verkita de T. Corder Catchpool.

Mallonga skizo pri la historio kaj
kredoj de la religia Societo de Amikoj,
populare nomataj „Kvakeroj“.

Prezo 2 pencoj.

Friends' Council for Inter-
national Service, -

91 Bishopsgate, London, E. C. 2,
aŭ ĉe

British Esperanto Association,
17 Hart Street, London, W. C. 1.

Tiu, kiu reklamas en la internacia lingvo, konatigas tra la tuta mondo.

DENTEX

Purigajo por artaj dentoj
Rapide purigas falsdentarojn kaj
similnovigas ilin

Ĉi pereigas mikrobojn tuj kaj donas
senton de plezuriga pureco

1/- PER LADSKATOLO

Poŝtelspezo aldone

Angle, 3 d. (125 spesoj)
Fremdiande, 6 d. (250 spesoj)

W. MINCHIN, Farmaciisto
15 WESTGATE, GLOUCESTER

ALFARITAĴO de la
STENOGRAFO de PITMAN
al ESPERANTO

(Afrankite, 1s. 1 p., Sm. 0.55)

de A. W. LYNDRIDGE
F.I.P.S., F.B.E.A.

ĈIU ESPERANTISTO

DEVAS UZI

La ESPERANTO FONTPLUMON

7s. d., Sm. 3.75

DE

La Estro: Business Training College
and Typewriting Copying Office

WESTON ROAD
SOUTHEND-ON-SEA, ANGLUJO

AGENTOJ BEZONATAJ!

THE MANUFACTURERS OF SPICE-ERBO

have pleasure in introducing

ZENITO

to all who desire good, wholesome food.

ZENITO is made entirely from wheat. It is highly nutritious, economical, labour-saving, and always ready.

ZENITO makes the most delicious puddings, no flour required, and is a necessity for Savouries, Fried Fish, Stuffings, and Vegetarian Cooking.

Do not trouble to make bread crumbs—use **ZENITO**—better and cheaper. being ready cooked, is an excellent substitute as a breakfast food for children and adults. Simply pour milk over a small portion and serve.

GET A PACKAGE TO-DAY

For sale in London at J. Barker & Co., Kensington, and at Selfridge's

WHEN IN LONDON VISIT

THE ZENITO CUISINE and RESTAURANT

4 CHENISTON GARDENS. Two minutes from High Street, Kensington (Underground)

ALL FOOD COOKED ELECTRICALLY

Frank H. Lockyer Supply Co., Ltd., Liverpool

SAMIDEANOJ ATENTUI!

La fabrikistoj de **Spice-Erbo** atentigas ĉiujn kiuj deziras bonan nutraĵon pri **ZENITO**. **ZENITO** estas entute fabrikata el **tritiko**. Ĝi estas altrada nutraĵo, ekonomia, **laborŝparema**, kaj ĉiam preta. El **ZENITO** la plej bongustaj pudingoj povas esti farataj, la faruno ne estas bezonata kaj **ZENITO** estas necesajo por ĉiuj bongustajoj, fritita fiŝo, stufajoj kaj vegetara kuirado.

Ne ĝenu vin per la farado de paneroj. **UZU ZENITO**, ĝi estas multe pli nutrema kaj pli malmulte-kosta. Ĉar ĝi estas **jam kuirita**, ĝi estas bonega anstataŭajo kiel matenmanĝaĵo **por infanoj kaj plenkreskuloj**.

Nur superversu lakton sur malgrandan porcion kaj metu sur la tablon.

HAVIGU PAKAĴON HODIAŬ

Oni vendas **ZENITO** en London ĉe J. Barker & Co., Kensington kaj Selfridge's, kaj ĉe—

H. Crisfield, 5 Russell Gardens, Kensington, W.
F. Craham, 48 High Street, Highgate, N.6.
Surrey—G. Hepburn, Wallington.
Manchester—W. H. Nuttall & Co., Swan Street.
Liverpool—Brooks & Co.
Robert Roberts & Co. and Branches.
Health Stores, Whitechapel.
Glasgow—Cooper & Co.
Edinburgh—Jas. Harper & Sons.
St. Andrews, N. B.—A. Haxton & Sons.

Aberdeen—Jas. Leith, Union Street.
Newcastle-on-Tyne—Pumphrey & Carrick Watson
Middlesboro—Amos Hinton & Sons.
Hull—Brown, Holmes & Cox.
Bradford—Moreland Bros.
Burnley—T. Haworth, Howe Street.
Bury—A. Hawkisstone.
Bridgend, Glamorgan—W. H. Thomas.
Birkenhead—J. M'Loughlin, Price Street.
Etc.

LONDONANOJ KAJ VIZITANTOJ AL LONDON VIZITU

THE ZENITO CUISINE kaj RESTORACIO,

4 Cheniston Gardens. Du minutoj de High Street, Kensington (Underground)

ĈIUJ NUTRAĴOJ KUIRATAJ ELEKTRICE.

Frank H. Lockyer Supply Co., Ltd., Liverpool